

LA VENTEGO  
DE  
SHAKESPEARE

*Tradukita de  
Ach. Motteau*

*Eldonata de*  
THE ESPERANTIST  
LONDON

CHATHAM:  
PRINTED BY W. & J. MACKAY & CO., LTD.

## Antaŭparolo.

La plej malnova presita ekzemplero de *La Ventego* troviĝas en la foliega volumo, kiun la aktoroj Heminge kaj Condell—ambaŭ kolegoj de Shakespeare—preparis en la jaro 1623<sup>a</sup>; kaj ĝia unua prezentiĝo okazis la 1<sup>an</sup> de Novembro, 1611<sup>a</sup>, laŭ samtempaj raportoj.

Tiuj faktoj klarigas la maturan belecon, la riĉege imagitan fantazion de tiu nobla dramo, videble verkita dum la maturaĝo de ĝia kreinto unu el liaj lastaj ĉefverkoj—eble la lasta.

*Al la Majstro, la Elpensinto de Esperanto!*

*Ĉu LA VENTEGON Esperantigante  
Mi tro atencas? Diru al mi, Majstro.  
Ho! ŝajnas mia Shakespeare tia fonto  
Ke ĉiutage ĉerpas mi belaĵojn  
En liaj helaj paĝoj! Do rigardu  
Ne tro severe tiun ĉi libreton,  
Malindan eĥon je l' Avona Cigno.*

A.M.

# La Ventego.

## Personoj:

ALONZO, *Reĝo de Neapolo.*

SEBASTIANO, *frato de Alonzo.*

PROSPERO, *rajta Duko de Milano.*

ANTONIO, *frato de Prospero, duka uzurpulo de Milano.*

FERDINANDO, *Reĝido de Neapolo, filo de Alonzo.*

GONZALO, *honestaj maljuna konsilano.*

ADRIANO, FRANCISKO, *kortegaj sinjoroj.*

KALIBANO, *Sovaĝa kaj malbela sklavo.*

TRINKULO, *kortega amuzulo.*

STEFANO, *drinkema kelisto.*

ŜIPESTRO, SUBESTRO, MARISTOJ.

MIRANDO, *filino de Prospero.*

ARIELO, *aera spirito.*

IRISO, CERESO, JUNO, NIMFOJ, RIKOLTISTOJ, *spiritoj.*

*Aliaj spiritaj servistoj de Prospero.*

\* La Agado havas lokon unue en ŝipo apud la landbordo, poste sur insulo.

## Akto I.

**Sceno 1.—En ŝipo.—Ventega fulmotondra bruego aŭdata.**

*(Venas ŝipestro kaj subestro).*

ŜIPESTRO.

Subestro!

SUBESTRO.

Tie ĉi, mastro; kion vi ordonas?

ŜIPESTRO.

Bone; admonu la maristojn, vigligu ilin, aŭ la ŝipo disrompiĝos sur la ŝtonegoj. Vigle, vigle!

*(Venas maristoj).*

SUBESTRO.

He! kamaradoj, kuraĝe! kuraĝe! Bravuloj, vigle! vigle! Mallevu la velojn; atentu la fajfilon de l' mastro! . . . Nun, blovu, ventoj, ĝis vi krevos, se estas sufiĉa spaco!

*(Venas ALONZO, SEBASTIANO, ANTONIO, FERDINANDO, GONZALO, kaj aliaj).*

ALONZO.

Bona subestro, atentu! kie estas la ŝipestro? Brave agu, ŝipanoj!

SUBESTRO.

Mi petas ke vi restu malsupre.

ANTONIO.

Kie estas la ŝipestro, subestro?

SUBESTRO.

Ĉu vi ne aŭdas lin? Vi malhelpas nian laboron. Restu en viaj ĉambretoj. Vi nur helpas la ventegon tie ĉi.

GONZALO.

Neniel; estu pacienca!

SUBESTRO.

Jes, tuj kiam la maro estos. Iru for de tie ĉi! Ĉu tiaj blekegantoj timas reĝan nomon? Ne! Iru en la ĉambron. Silentu! Ne malhelpu nin.

GONZALO.

Prave; memoru, tamen, tiujn kiujn la ŝipo portas.

SUBESTRO.

Neniun kiun mi pli amas ol min mem. Nu! vi estas konsilano; se vi povas ordoni ke tiuj ĉi elementoj silentu kaj tiamaniere trankviligu la nunan veteron, bone; ni ne tuŝos plu ian ŝnuregon; uzu vian povon! Sed, se vi tion ne povas, estu danka ke vi jam tiel longe vivadis, kaj en via ĉambreto pretiĝu por ia ebla estonta malfeliĉo, se ĝi okazos. (*Al la maristoj*). Vigle, kamaradoj! (*Al la aliaj*). For de tie ĉi, mi petas!

(*Foriras*).

GONZALO.

Mi ja ĝojas pri tiu ĉi malĝentilulo; ŝajnas al mi ke sur li ne estas signo de drononto; li perfekte prezentas pendigoton! Ho, sorto! zorgu por lia pendiĝo; ke lia sorta ŝnuro nun fariĝu nia sava ŝnurego, ĉar, alie, ni ne povos esperi ian bonaĵon: se li ne naskiĝis pendonta, vere, mizera estas nia stato!

(*Ĉiuj foriras*).

(*Revenas la subestro*).

SUBESTRO.

Faligu la grandmaston! vigne! pli malsupren! Penu direkti la ŝipon al la maro! (*Ekkrioj interne*). Malbenon al tiuj kriegoj! Ili bruegas pli laŭte ol la blovado, aŭ eĉ nia propra kriado! . . .

(*Revenas* SEBASTIANO, ANTONIO, kaj GONZALO).

Ree? Ankoraŭ? Kion vi faros tie ĉi? Ĉu ni devos ĉesigi nian penadon kaj droni? Ĉu vi deziras iri al la marfundo?

SEBASTIANO.

Ha, peston al via faringo, kriemulo, blasfemanta malbenita hundo!

SUBESTRO.

Nu, do, laboru vi mem!

ANTONIO.

Pendu, malbona hundo; pendu, filo de malvirtulino, insultema bruegulo! Ni ne tiel kiel vi timas droni.

GONZALO.

Ho! lin mi asecuras kontraŭ la dronado, kvankam la ŝipo ne estus pli fortika ol nuksa ŝelo.

SUBESTRO.

Direktu la ŝipon! Du gradojn plie, al la maro . . . haltu!

(*Venas maristoj tute akvokovritaj*).

MARISTOJ.

Ĉio estas perdita! ni preĝu! ni preĝu! Ĉio perdita!

(*Foriras ĉiuj*).

SUBESTRO.

Ĉu niaj buŝoj malvarmiĝos? Kion?

GONZALO.

La reĝo kaj la princoj ĉiuj preĝas:

Samstate ni kun ili preĝi devas.

SEBASTIANO.

Mi perdas paciencon.

ANTONIO.

Ni pereos  
Per la maldiligento de drinkuloj—  
(*Al la subestro*) Larĝfaŭka bruegulo, mi tre volus  
Vin vidi droni en dek maralfluoj!

GONZALO.

Pendonta, tamen, li post ĉio restos,  
Ja, kvankam plendos ĉiu guto akva,  
Kaj larĝe malfermiĝos por lin gluti . . .  
(*Ekbruoj interne*) Ĉiel' kompatu! nun fendiĝas ŝipo!  
Adiaŭ do, edzino kaj infanoj!  
Ho ve, adiaŭ, frato! ĝi fendiĝas!

ANTONIO.

Ni ĉiuj nun fundiru kun la reĝo! (*foriras*).

SEBASTIANO.

Ni iru tuj al li adiaŭ diri! (*foriras*).

GONZALO.

Nun, volonte, mi ŝanĝus mil mejlojn da marakvo nur por seka terpeco,  
longa erikejo, bruniĝinta dornstipejo,<sup>[1]</sup> io ajn! Estu do la superega  
Volo! sed mi preferus seke morti.

(*Foriras*).

**Sceno 2.—*Sur insulo.*—Antaŭ la ĉambreto de PROSPERO.**

(*Venas PROSPERO kaj MIRANDO*).

MIRANDO.

Karega patro, se per via povo  
La maro tiel brue sovaĝiĝis,  
Ho, trankviligu ĝin! Nun preskaŭ ŝajnas  
Ĉiel' malbonodoran peĉon vomu,  
Se supraj ondoj ne estingos fajron . . .  
. . . Suferis mi kun la malfeliĉuloj  
Videble kiuj dronis en la ŝipo!  
Kreitoj noblaj ili estis, eble,  
Kaj, jen! nun estas ĉiuj disrompitaj . . .  
. . . Ĝemegoj ĝis la mia kor' atingis!  
Se ia dio estus mi potenca,  
En teron volus mi trapuŝi maron,  
Prefere ol engluti belan ŝipon  
Ŝarĝitan tute je animoj homaj! . . .

PROSPERO.

Ne plu miregu nun, kaj kvietiĝu;  
Al via kompatema koro diru:  
Ne malbonaj' okazis.

MIRANDO.

Ho ve, patro!

PROSPERO.

Nenio, ja, filino, ĵus okazis  
Krom tio, kion mi efektivigis  
Por vi, filino mia, karulino!  
Vi kiu ido estas nescianta,  
Ĉar, nek vi scias pri l'elveno mia,  
Nek konas min pli altan ol Prosperon,  
La mastron de malriĉa tia loko,  
Kaj simplan patron vian.

MIRANDO.

Mi neniam

Imagis plie.



PROSPERO.

Estas nun la tempo,  
Kaj vin mi devas plie tuj informi.  
—Forprenu la magian veston mian—

*(Demetas la mantelon).*

Magio, restu. Plu ne ploru, kara;  
Konsolu vin. Terura la vidaĵo  
De ŝippereo, kiun vi bedaŭras,  
Okazis tiel, per magia povo,  
Ke iu, kiu estis en la ŝipo  
Nek mortis, nek eĉ haron tie perdis,—  
—Kriegojn kvankam aŭdis vi kaj vidis  
Fundiri ŝipon—Sidu, nun, Mirando,  
Ĉar vi plimulte devas tuj sciigi.

MIRANDO.

Vi ofte jam al mi ekparoladis  
Pri mia la deven', sed ĉiam haltis,  
Lasante min ankoraŭ nekonantan.

PROSPERO.

Sed nun la ĝusta horo fine venis,  
La nunminut' postulas ke vi aŭdu.  
Obeu, aŭdu. Ĉu vi ne memoras  
Epokon . . . aliloke ol ĉi tie? . . .  
Memori vi ne povas, kompreneble,  
Ĉar tiam vi ne estis eĉ trijara!

MIRANDO.

Sed iometon povas mi . . .

PROSPERO.

Memori?

Pri kio? pri personoj? domo? Nomu  
L'imagon kiu en vi konserviĝis.

MIRANDO.

Kredeble estas songo malproksima.  
Sed ne memoro, kiun mi posedas . . .  
. . . Ĉu servis min aŭ kvar aŭ kvin virinoj?

PROSPERO.

Virinoj multaj servis vin, Mirando!  
Sed, kiel povis tia fakto loĝi  
En via nematura la memoro?  
Nu! vi memoras pri antaŭfariĝo . . .  
Ĉu eble kiel vi ĉi tien venis?

MIRANDO.

Sed mi ne povas.

PROSPERO.

Antaŭ dek-du jaroj,  
La patro via, dek-du jaroj antaŭ,  
Regnestro estis, de Milano duko.

MIRANDO.

Ĉu vi, sinjor', ne estas mia patro?

PROSPERO.

Patrino via ĉiam estis virta:  
Ŝi diris ke vi ido mia estas,  
Kaj via patro, duko de Milano,  
Heredontinon unu sole havas:  
Princino rajte estas ŝi naskita.

MIRANDO.

Ĉiel'! per kia perfidaj' ni perdis  
Grandecon tian? Ĉu por nia bona,  
Ĉu malfeliĉa sorto?

PROSPERO.

Ambaŭ, kara.

Perfido nin forpelis el Milano,  
Sed ni beniĝe tien ĉi alvenis.

MIRANDO.

Ho! mia kor' sangadas ĉe la penso  
Je la malhelpo kiun mi vin kaŭzis.  
—Mi kvankam ne rememoriĝas tion—  
Bonvolu vi daŭrigi.

PROSPERO.

Via onklo,—

Jes, mia frato Antonio—Aŭdu!  
—Ke frato povis tiel perfidiĝi!—  
Krom vi mem, homo, kiun mi koramis  
La plej en mondo—kiu eĉ regadis  
Duklandon mian, tiam la unuan,  
Ĉar estis mi el dukoj la plej alta!  
Precipe fama per indeco mia,  
Mi artamulo brilis senegala;  
Lernante tempon mi libere uzis,  
Regadon forlasinte al la frato . . .  
Del' lerno l' amo tiel min okupis  
Ke fremda mi fariĝis al la ŝtato.  
Perfida onklo via . . . Ĉu vi aŭdas?

MIRANDO.

Sinjoro, tre atente.

PROSPERO.

Nu, li frue

Ricevis prince multon da petantoj,  
Rifuzis kelkajn, kelkajn kuraĝigis,  
Kaj malobeon punis. Li renomis,  
Li anstataŭis eĉ sekvantojn miajn,  
Aliformigis ilin; ĉar li havis  
Ŝlosilon oficejan, ja, la homan,

Kaj laŭdi lin regnanojn li instruis;  
Ĉar kiu flatis plej l' orelon lian  
Profiton plej ricevis. Nun li estis  
Hedero princan trunkon vualanta,  
Suĉanta eĉ verdaĵon mian propran!  
—Vi ne aŭskultas . . .

MIRANDO.

Patro, tre avide!

PROSPERO.

Atentu, kara! . . . Mi, konfidemulo,  
Pri ŝtataferoj nun ne plu zorgante,  
Al pliboniĝo de klereco mia  
Dediĉis tempon: la malica frato  
Profitis. Malgraŭ mia grandanimo,  
Solece, mi fariĝis nekonato . . .  
Malbona sento movis Antonion  
Vidantan min senlime lernamulon  
Konfido mia naskis kulpon lian;  
Senlima same lia ambicio  
Fariĝis; ankaŭ la kvieto mia.  
Nu, provizita ne nur je trezoroj  
Sed je la povo eĉ postuli plie—  
—Mensoge ĉiam se agadas homo,  
Memoron sian tiel li pekigas,  
Ke la malveron li jam plu ne sentas—  
Jam Antonio pri si mem ekpensis  
Ke li la duko estas. Ĉar li agis  
Plenege tiam kiel duklandestro;  
Privilegion ĉian li posedis,  
Kaj tial plialtiĝis—Ĉu vi aŭdas?

MIRANDO.

Ho! tian diron aŭdus surdulino.

PROSPERO.

De mi plu li ne vidis vualitan  
La rolon kiun ludis Antonio—  
Min rigardante kiel malsaĝulon,  
Kaj reĝon sole de mizeraj libroj—  
Li absoluta duko sin anoncis!  
Avida tiel estis li je povo  
Ke li konsentis al la reĝ' Alonzo  
Duklandon fari depagantan jare,  
Submetis dukan al la reĝa krono,  
Milanan kapon altan li klinigis  
Duklando, ĝis li, ĉiam liberama!  
Ve! kia mallevaĵo!

MIRANDO.

Diaj povoj!

PROSPERO.

Kondu-ton lian notu, al mi diru  
Ĉu frate kun mi agis via onklo—

MIRANDO.

Mi pekus se ne noble mi ekpensus  
Pri la avino mia—Sed patrinoj  
Bonegaj naskis tre malbonajn filojn.

PROSPERO.

L' enradikita malamiko mia,  
Alonzo tuj aprobis la proponon  
Per kiu, por la submetiĝo landa  
Kaj jara pago de dukatoj multaj,  
Forpelus Antonio min kaj miajn  
El la duklando, kiun de la reĝo,  
Kun multaj ĝojaj, luksaj gratulegoj,  
Akceptis nun perfida mia frato.  
Soldatojn estis li subaĉetinta;  
Pordegojn li malfermis en la nokto . . .  
Envenis bando kiu, tra l' mallumo,

Forportis min kaj ankaŭ vin ĝemantan  
Rapide el Milano!

MIRANDO.

Ho ve, patro!  
Tiamajn plorojn mi ne plu memoras,  
Sed la pripenso min devigas plori.

PROSPERO.

Aŭskultu tamen, plie, ĝis mi venos  
Al nuna la afero—ĉar sen tio  
Ne taŭgus la rakonto.

MIRANDO.

Kial ili  
Tuj ne mortigis nin?

PROSPERO.

Demando prava,  
—El la rakonto rajte postulata—  
Pro l' amo de l' popolo al Prospero  
Ne faris ili sangavidan krimon:  
Perfidon tiel ili belŝajnis  
Ke ĝi blindigis ĉiun Milananon.  
En barko nin elsendis ili maren,  
Sed, kiam la marmezon ni atingis,  
Nin ili ĵetis en putrantan ŝipon  
Senmastan, senŝnuraĵan, forlasitan  
Eĉ de la ratoj.—Ho ve! malfeliĉaj!  
Ni ekkriadis al la marondegoj,  
Ekĝemis ni al la ĝemantaj ventoj . . .  
Koncerto stranga, sed ne simpatia!

MIRANDO.

Ĉielo! kia mi malhelpo estis!

PROSPERO.

Ho ne! Fariĝis vi kerubo vera,  
Traplenigita de l' ĉiela beno;  
Rideto via min revivigadis!  
Mi maron kiam faris pli salitan  
Per el la koro tiel akraj ploroj,  
Vi kuraĝigis min kaj fortigadis  
Por kontraŭstari eblan mizeregon!

MIRANDO.

Sed kiel ni el ŝipo landon trafis?

PROSPERO.

Per Dia helpo, kara!—Jes; nutraĵon  
Ni havis—kiun reĝa konsilano  
Gonzalo—elektita de Alonzo  
Por tiel nin elpeli—al ni donis.  
Ĉiele inspirita bonfarinto!  
Li plie riĉajn vestojn, ŝtofojn, silkojn  
Aldonis—pli eĉ ol mi diri povas!  
Objektojn, kiujn ĝis nun ni uzadis,  
Utilajn kaj bonegajn. Ĉar li sciis  
Ke estas mi precipe libramulo,  
Eltiris li el la biblioteko—  
De mi ŝatita pli ol la duklando—  
Amatajn librojn, kaj al mi alportis.

MIRANDO.

Ĉielo volu tiun homon beni!  
Mi tre dezirus vidi lin!

PROSPERO.

(*Remetas la mantelon*). Mirando,  
Aŭskultu de l' rakonto la finiĝon.  
Ĉi tien, sur insulon ni alvenis,  
Ĉi tie mi mem, edukisto via,  
Instruis vin pli zorge ol princinon  
Ĝuantan vane multajn liberhorojn,

Aŭ guvernistojn ne zorgamajn tiel.

MIRANDO.

Ĉielo rekompencu vin!—Nu, patro,  
Mi petas, diru kial vi ĵus kaŭzis  
Tielan marventegon.

PROSPERO.

Nu! sciiĝu  
Ke tien ĉi hodiaŭ, per okazo  
Feliĉa, kvankam stranga, ĵus alvenis  
La malamikoj miaj. Nun dependas  
Zenito mia de favora stelo,  
Influan kies devas mi fidele  
Akcepti—aŭ neniam releviĝi—  
Demandoj ĉesu!—Vi nun dormi volas—  
Kontraŭbatali tion vi ne povos—  
Filino, ĝin obeu!

(MIRANDO *ekdormas*)

(*Vokante*).

Servisto, venu! venu, Arielo!  
Mi estas tute preta: venu! venu!

(*Aperas ARIELO*).

ARIELO.

Saluton al vi, granda mia mastro!  
Laŭ via bondeziro tuj mi venas.  
Ĉu flugi, naĝi, trafajriĝi, rajdi  
Sur nubaj volvoj min vi nun devigos?  
Tuj Arielo agos.

PROSPERO.

Ĉu, spirito,  
Vi kaŭzis la ventegon laŭ l' ordono?



ARIELO.

Precize, mastro. Mi la reĝan ŝipon  
Enflugis: ĉu postparte, ĉu antaŭe,  
Ĉu sur ferdeko, ĉu en la ĉambretoj,  
Mirigon mi dissemis, ekbruligis  
Multegajn lokojn mi, per unu fojo;  
Ĉe l' masta pinto velojn kaj ŝnuraĵojn  
Videble mi flamigis, tiam, kune  
Interligiĝis flamoj. Pli momentaj,  
Eĉ pli rapidaj ol la fulmotondroj,  
La flamoj, krakoj de l' sulfura muĝo! . . .  
Neptunon mem sieĝi eĉ mi ŝajnis,  
Kaj kun la ondoj la tridento tremis!

PROSPERO.

Spirito brava! En tumulto tia,  
Sufiĉa por ŝipanojn frenezigi,  
El ili kiu povis agi saĝe?

ARIELO.

Neniu; ĉiuj malsaĝuloj ŝajnis  
En malespera stato. Krom maristoj,  
Tuj subakviĝis ili el la ŝipo  
De mi ekbruligita. La reĝido,  
Kun haroj stariĝantaj kiel kanoj,  
Unue maren ĵetis sin, kriante:  
“Infero certe estas nun malplena!  
Ĉi tie nun la diablaro loĝas!”

PROSPERO.

Bonege, Arielo! Ĉu proksime  
De l' lando ne fariĝis ŝippereo?

ARIELO.

Proksime, mastro.

PROSPERO.

Ĉu nun ĉiuj vivas?

ARIELO.

Ne haro mankas, kaj iliaj vestoj  
Pli freŝaj vere ŝajnas ol antaŭe;  
Laŭ via volo ilin mi disigis  
Per bandoj travagantaj nun l' insulon,  
Kaj Ferdinando, la reĝido, sola  
De mi lasita, estas en angulo;  
Sopire, li l' aeron malvarmigas  
Kaj, tiel, brakokruciĝinte, sidas.

PROSPERO.

La reĝan ŝipon, ankaŭ la maristojn  
De la ŝiparo, kiel vi disponis?

ARIELO.

Savita estas nun la ŝipo reĝa  
Ankrita en la profundega golfo—  
De kia loko min, je l' noktomezo,  
Vi vokis iam por alporti roson  
El ventetiĝa Bermudinsularo—  
La ŝipo tie kuŝas. La ŝipanoj  
Miregigitaj, lacaj de penado,  
Sub la ferdeko nun sorĉarte dormas.  
Ceteraj ŝipoj kiujn mi disigis  
Interrenkontis sin, kaj Neapolon  
Malĝoje iras.—Ŝiparestro pensas  
Ke l' reĝan ŝipon li fundiri vidis,  
Kaj ke en mar' pereis la regnestro.

PROSPERO.

Mision vian, Arielo, bone  
Plenumis vi; alia tamen ago  
Farota restas. Kia estas l' horo?

ARIELO.

La posttagmeza.

PROSPERO.

Du sabloŝutiloj  
Sin malplenigos ĝis la sesa horo:  
Ni dume devas bone tempon uzi.

ARIELO.

Ĉu plie mi labori devas, mastro?  
Bonvolu vi memori la promeson  
Al mi faritan sed ne plenumitan.

PROSPERO.

Ĉagrena? Kial do?

ARIELO.

Min liberigu! . . .

PROSPERO.

Ne antaŭ ol la tempo venos!

ARIELO.

Mastro!

Kompatu min, ĉar mi ja tre fidele  
Vin servis—ne mensogis—ne eraris . . .  
Vin servis senŝpareme, senmurmure,  
Kaj, mastro, vi promesis de plenjaro  
Rabaton.

PROSPERO.

Ĉu, spirito, vi forgesas  
El kiaj turmentegoj mi vin tiris?

ARIELO.

Neniam.

PROSPERO.

Jes! vi ĉion nun forgesas.  
Ja ŝanceligos vin trapremi ŝlimon,  
Por mi sur akra norda vento rajdi,  
Aŭ vin trapuŝi en la frostan teron,  
Se tiel mi ordonos! Vi forgesas . . .

ARIELO.

Neniam.

PROSPERO.

Malbonulo! vi mensogas!  
Eĉ vi forgesas kiel Sikorakso—  
Malpura sorĉistino kurbigita  
Per multaj jaroj kaj malbondeziroj—  
Agadis.

ARIELO.

Mastro, ne!

PROSPERO.

Ja vi forgesas.  
Nu, diru al mi kie ŝi naskiĝis.

ARIELO.

En Alĝerlando.

PROSPERO.

Ho! vi tion scias.  
Monate al vi devos mi rediri  
La staton tiam vian; vi forgesas.  
Pro multaj krimoj kaj teruraj sorĉoj  
Ne kompreneblaj por l' animo homa,  
L' inferan sorĉistinon Sikorakson  
Devigis tuj foriri l' Alĝeranoj—  
Nur ĉar ne volis ili ŝin mortigi.

ARIELO.

Jes, mastro.

PROSPERO.

Nubokula sorĉistino!

Gravedan la maristoj ŝin forlasis  
Ĉi tie! kie vi—laŭ via diro  
Nun mia sklavo—tiam ŝin obeis!  
Sed tro aera vi, spirito, estas  
Por ŝiajn abomenojn nepre fari:  
Senlime furioza Sikorakso,  
Per helpo de rimedoj potencegaj,  
En tago, vin, al ŝi malobeintan,  
Enfermis en fendaĵon de pinarbo.  
Nu! tie vi suferis dek-du jarojn;  
Dum tiu tempo Sikorakso mortis,  
Lasinte vin por ĝemi, akre krii,  
Rapide, muelile, tra la ventoj!  
Ankoraŭ estis la insul' senhoma,  
Krom bestoforma la sorĉistinido.

ARIELO.

Ĝi estas Kalibano.

PROSPERO.

—Bestegulo!

Lin dresis mi por la domoservado—  
Senĉesaj, dume, krioj viaj kaŭzis  
Kriegi lupojn, eĉ kortuŝis ursojn . . .  
Infera turmentego! Sikorakso  
Ĝin povis ne forigi—Sed mi venis,—  
Aŭdinte vin, la pinon oscedigis . . .  
Magie mi vin savis.

ARIELO.

Dankon, mastro!

PROSPERO.

Se nun vi remurmuros mi tuj fendos  
Trunkegon kverkan kies tuberaĵoj  
Englutos vin por krei dekdu vintrojn!

ARIELO.

Pardonu, mastro; mi estos obeam,  
Kaj spiritaĵon mian de nun faros  
Ĝentile.

PROSPERO.

Agu tiel; post du tagoj  
Vi liberiĝos.

ARIELO.

Nobla mastro mia!  
Mi kion faros? kion? diru, kion?

PROSPERO.

Foriru; mara nimfo vi fariĝu,  
Sed, krom por mi, por ĉiuj nevidebla.  
Rapidu ĝis vi estos tiaforma,  
Kaj tien ĉi revenu! (*Malaperas* ARIELO).  
(*Laŭte al* MIRANDO). Kara koro!  
Mirando, vi vekigu! ho! vekigu!  
Bonege jam vi dormis; nun, vekigu!

MIRANDO.

Rakonto stranga via al mi kaŭzis  
Profundan dormon.

PROSPERO.

Tion de vi skuu.  
Ni iru nun viziti Kalibanon;  
Neniam li respondon bonan donas.

MIRANDO.

Li estas terurega malbonulo:  
Ne amas mi lin vidi.

PROSPERO.

Sed, filino,  
Lin ni bezonas. Fajron ekbruligi,  
Alporti lignon, kaj balai ĉambron,  
Utila certe estas—Kalibano!  
Ho, sklavo, ŝlimo, kie vi kaŝiĝis?

KALIBANO.

*(El interne)* Lignaro jam interne estas.

PROSPERO.

Venu!

Alian faron tuj mi al vi donos:  
Testudo, venu!

*(Reaperas ARIELO akvanimfoforma).*

Bele, Arielo;  
*(Mallaŭte)* Aŭskultu bone.

ARIELO.

Faros mi, Sinjoro! *(Malaperas).*

PROSPERO.

Venena sklavo, sorĉa diablido,  
Tuj venu tien ĉi! *(Venas KALIBANO).*

KALIBANO.

Malsano roso,  
De Sikorakso ŝlime balaita,  
Per korva plumo sur vin nun ŝpruciĝu!  
Sud-okcidenta vento vin aknigu!

PROSPERO.

Pro tio, certe, vi, hodiaŭ nokte,  
Suferos streĉojn, flankpikaĵon sentos—  
(Elspiron haltiganta vizitisto!)—  
Eĉ erinacoj sur vi ekzerciĝos;  
Mieltavole estos vi pinĉita:  
Pli pika ĉiu pinĉo ol abelo!

KALIBANO.

Mi nun bezonas la tagmanĝon mian:  
Al mi l'insulo rajte apartenas;  
Ĝin mi heredis de patrino mia,  
Ĝis de mi vi forŝtelis la posedon.  
Unue vi karesis min, eĉ ofte  
Vi akvon berogustan al mi donis;  
La grandan kaj malgrandan lumojn montris  
Brulantajn tage, nokte, al mi diris  
Iliajn nomojn. Tiam mi vin amis,  
Kaj montris al vi la insulajn ecojn,  
La freŝajn fontojn, fruktodonan landon,  
Malbeno! salajn lokojn kaj herbejojn . . .  
Mi ĉion montris! . . . Ke la sorĉartiloj  
De Sikorakso, buf', skarab' vesperto . . .  
Sur vin tuj falu!—Estas mi subulo!  
Mi tiam sola mia propra reĝo!  
Min porke nun vi tenas en ŝtonego,  
Dum la ceterajn partojn vi posedas!

PROSPERO.

Mensoga sklavo, kiun bonaj agoj  
Neniam povis tuŝi, sed nur skurĝo!  
Ŝlimido, mi unue kun vi agis  
Zorgeme, home, eĉ mi vin lokadis  
En groto mia . . . ĝis vi idon mian . . .  
Atencis malvirgigi. . . .

KALIBANO.

Vi malhelpis.



Se rajte estus ĝi de mi farita,  
L' insulo estus Kalibanigita!

PROSPERO.

Ho, sklavo abomena, ne ameco  
Kortuŝos vian malbonecon bestan;  
Nur povas vi plenumi bestan rolon.  
Kompate, mi paroli vin instruis,  
Novaĵon taŭgan montris tage, hore;  
Bestulon, kiu tiam sole blekis  
Simile al la bruto, mi instruis  
Paroli home, kaj objektojn nomi.  
Sed, parolante, via bruti raso  
Enhavas tion, kio ne permesas  
Honeste agi: tial en ŝtonego,  
Malliberulo vi de tiam restas,  
Anstataŭ pli malbona sorto.

KALIBANO.

Vere

Paroli vi min faris: la profito  
Jen estas: mi nun povas vin malbeni.  
Erisipelo ambaŭ vin mortigu!  
Mi lernis tion el la lingvo via.

PROSPERO.

Sorĉido! for de tie ĉi! rapidu!  
Hejtaĵon tuj alportu, mi konsilas;  
Plimulte poste, sed nun tion faru!  
Ĉu ŝanceliĝas vi, ĉu malobeos,  
Mi tiam streĉos la muskolojn viajn,  
Kaj ostojn dolorigos: vi blekegos . . .  
La bestojn timigante.

KALIBANO.

Ne, mi petas.  
(*Flanken*). Obei li magie min devigas.

Potenco tia ke l' patrino dio  
Setebos estus ĝia sklavo!

PROSPERO.

Iru! (*Foriras* KALIBANO).

(*Revenas* ARIELO *nevidebla, ludante kaj kantante; sekvas* FERDINANDO).

KANTO DE ARIELO.

*Sur la flavan sablon venu,  
Manojn interprenu;  
Salutintaj, eĉ kisintaj,—  
(Paca mar' sin tenu!)—  
Tie ĉi kaj tie saltu,  
Koboldeme: nun, ni haltu.  
Aŭskultu!*

Rekantaĵo (malproksime): *Boju, hundoj, boju!*

*Hundoj, boju, boju!*

Rekantaĵo: *Boju, hundoj, boju!*

*Aŭdu nun la kokan krion;*

*Ĉantiklirio<sup>[2]</sup> kantas tion:*

*“Kokaraŭko!”*

*Krias koko.*

FERDINANDO.

El kie venis tia stranga kanto?  
El aer' aŭ el tero? . . . Plu ne sonas . . .  
Ĉu estas io de insula dio?—  
Mi sidis ploreganta pri la sorto  
De mia patro kiu ĵus pereis . . .  
Dolĉegaj sonoj venis super l' ondo,  
Ĝin kvietigis,—eĉ doloron mian,—  
Altiris min ĉi tien l' harmonio;  
Sed ĵus forĉesis . . . Ne! ĝi rekomencas . . .

ARIELO *kantas:*

*Sub tridek futoj da marakvo*

*Profunde patro restas;  
Fariĝas ostoj nun koralo;  
Okuloj perloj estas:  
Aliformiĝas li marame,  
Tre riĉe kaj orname.  
Hore mortsonoro tintas,  
Maraj nimfoj kantas:  
(Sonorila eĥo: Bum! bom! bam! bum!)  
Ilin aŭdas mi, . . . Aŭskultu!  
(Ĥora eĥo: Bum! bam! bom! bum!)*

FERDINANDO.

Ĝi diris pri droninta patro mia!  
Ne estas terdevena homa kanto  
Aŭdita de mi supre!

PROSPERO.

Ho! Mirando,  
Palpebroj viaj malfermiĝu: Kion  
Ekvidas vi antaŭen?

MIRANDO.

Kio estas?  
Spirit'? Ĉielo! kiel ĝi rigardas!  
Sinjoro, certe ŝajnas ĝi belforma;  
Spirito tamen estas.

PROSPERO.

Ne, knabino;  
Ĝi manĝas, dormas, sentojn ankaŭ havas  
Simile je ni. Tiu ĉi junulo  
En ŝippereo estis: pro ĉagreno  
Li markojn portas kiuj malbeligas  
Vizaĝon lian—vi, alie, povus  
Nobelon en li vidi. Li, perdinte  
Parencojn siajn, vage ilin serĉas.

MIRANDO.

Estajō dia povus mi lin nomi,  
Ĉar mi nenion vidis tiel nobla!

PROSPERO.

(*Flanken*). L' afero venas laŭ deziro mia:  
Ĉi tio Arielon liberigos  
Nur post du tagoj—

FERDINANDO.

(*Ekvidante Mirandon*). La diino  
Muzike ĵus laŭdita! . . . Mi petegas,  
Bonvolu diri al mi ĉu vi loĝas  
En tiu ĉi insulo; ĉu vi povus  
Konsilojn bonajn al mi doni;  
Sed, mirindaĵo! scii mi deziras  
Ĉu estas vi fraŭlino.

MIRANDO.

Mi, sinjoro,  
Ne mirindaĵo estas, sed fraŭlino.

FERDINANDO.

Ĉielo! mian lingvon! Mi ja estus  
El ĝiaj parolantoj la plej alta  
Se hejme nun ni starus.

PROSPERO.

La plej alta?  
Se l' Neapola reĝo tion aŭdus,  
Vi kiu estus?

FERDINANDO.

Simple la aŭdanto  
De homo parolanta pri la reĝo.  
Ke li min aŭdas tion mi bedaŭras,

Ĉar estas mi la reĝo: mian patron  
Perei mi ĵus vidis.

MIRANDO.

Ho, teruro!

FERDINANDO.

Li dronis, kun sinjoroj, kun Milanaj  
La dukoj, ankaŭ lia brava filo!

PROSPERO.

La dukoj de Milano, kaj bravega  
Filino lia, povus vin komandi  
Se dece estus. (*Flanken*) La du gejunuloj  
Intervidante tremis kaj ruĝiĝis . . .  
Nun Arielo baldaŭ liberiĝos.  
(*Al FERDINANDO*) Al vi, sinjor', mi vorton volus diri:  
Mi timas ke vi multe ĵus eraris.

MIRANDO.

Ĝentile kial patro ne parolis?  
De mi vidita estas homo tria  
Ĉi tiu, sed kortuŝa la unua.  
Kompato same movu mian patron!

FERDINANDO.

Fraŭlino, se vi estas korlibera,  
Reĝino Neapola vin mi faros.

PROSPERO.

Sinjoro, al vi tuj mi diros, haltu!  
(*Flanken*) Nu! ili estas intersimpatiaj:  
L' aferon mi ne volas rapidigi;  
Nenion tro facilan oni ŝatas.  
(*Al FERDINANDO*) Atentu, aŭdu, ĉar mi vin kulpigas  
Uzurpi ies nomon ne la vian:  
Spiono eble vi ĉi tie staras

Por poste ŝteli de mi la insulon.

FERDINANDO.

Ne! per honoro mia!

MIRANDO.

Malhonoro

Neniam loĝis en sanktejo tia:  
Ĉar se malbonon tia dom' entenus,  
Eĉ bono volus loĝi kun ĝi.

PROSPERO.

(Al FERDINANDO) Venu!

(Al MIRANDO) Por la spiono ne parolu.

(Al FERDINANDO) Venu!

Piede, kole, mi vin kunkatenos,  
Marakvon trinkos vi, via nutraĵo  
Konsistos el mituloj riveretaj,  
Radikoj sekiĝitaj, kaj glanŝeloj—  
Nu, venu!

FERDINANDO.

Ne! mi tuj kontraŭbatalos  
Tielan agon, ĝis la malamiko  
Pli pova montros sin. (*Eltiras sian glavon, sed tuj magie, ne povas movi*).

MIRANDO.

Ho, kara patro!

Tro ne ofendu lin, ĉar, dolĉanima,  
Li maltimulo estas.

PROSPERO.

(Al MIRANDO) Knabineto,  
Ĉu vi al mi konsilus? (Al FERDINANDO) Glavingigu,  
Ho, perfidulo, kiu ŝajni volus  
Sed ne maltimas frapi, tiel kulpo  
Tremigas vin! Plu ne kontraŭbatalu:

Bastono mia tuj vin senarmigos.

MIRANDO.

Mi vin petegas, patro—

PROSPERO.

(Al MIRANDO) Vi foriru!  
Ne tuŝu mian veston.

MIRANDO.

Ho! kompatu:  
Mi garantiulino por li estos.

PROSPERO.

Silentu! se vi diros unu vorton  
Mi vin kulpigos, eble vin malamos!  
Ĉu vi trompanton tian ŝirmi volus?  
Vi pensas, ke ne pli belformo estas,  
Ĉar vi nur vidis lin, krom Kalibanon.  
Anĝeloj vere la ceteraj homoj,  
Ĉi tiu nur alia Kalibano!

MIRANDO.

Amemo mia do, humila vere,  
Pli belan homon ne deziras vidi!

PROSPERO.

(Al FERDINANDO) Obeu; venu; la nervaro via  
Sen fortikeco, nun reinfaniĝas.

FERDINANDO.

Tro vere estas: nun min mem mi sentas  
Malliberulo. La kruela perdo  
De patro kaj amikoj, la minacoj  
De homo, kiu tiel min ofendis,  
Nu, ĉio al mi ŝajnus suferebla,

Se, foje, tage, mi ekvidi povus  
Ĉi tiun junulinon. Libereco  
Aliajn terajn lokojn povas ĝui:  
Sufiĉa spaco por mi estus tiu  
En kiu ŝi aperos.

PROSPERO.

(*Flanken*) Tio taŭgos:  
Vi bone ellaboris, Arielo.  
(*Al FERDINANDO*) Nun, venu!  
(*Al ARIELO*) Aŭdu plie por la sekvo.  
(*Al FERDINANDO*) Tuj venu kun mi!

MIRANDO.

Kuraĝiĝu, tamen,  
Ĉar bonnatura estas mia patro  
Pli ol paroloj liaj; li malofte  
Kolere agas.

PROSPERO.

(*Al ARIELO*) Ho, vi liberiĝos  
Simile al montventoj—sed, memoru  
Fidele la ordonojn.

ARIELO.

Akurate!

PROSPERO.

(*Al FERDINANDO*) Min sekvu!  
(*Al MIRANDO*) Kaj vi, por li ne petegu. (*Foriras ĉiuj*).



## Akto II.

### Sceno 1.—*En alia parto de l' insulo.*

(*Venas ALONZO, SEBASTIANO, ANTONIO, GONZALO, ADRIANO, FRANCISKO,  
kaj aliaj*).

GONZALO.

Ho, Reĝo, mi petegas, estu gaja:  
Okazo estas: ĉiu el ni ĝoju;  
Ĉar liberiĝon iu ne esperis,  
Kaj perdoj niaj estas mare oftaj:  
Maristedzinoj, komercistoj ofte  
Bedaŭras kiel ni kruelajn perdojn;  
Sed la miraklon de tiela savo  
El miliono malmultuloj sentis.  
Do saĝe, Reĝo, nian malfeliĉon  
Komparu kun ĉi tio.

ALONZO.

Ho, silentu.

SEBASTIANO.

Konsol' al li malvarma kaĉo estas.

ANTONIO.

La konsolanto tamen lin ne lasos.

SEBASTIANO.

Rigardu, li ŝerchorloĝeton streĉas:  
Malfrue ĝi sonoros . . . Nun!

GONZALO.

Sinjoro!

SEBASTIANO.

Unua:—diru.

GONZALO.

Kiam malfeliĉo  
Vizitas homon, kion ĝi alportas?

SEBASTIANO.

Dolaron.

GONZALO.

Jes, doloron ĝi prezentas:  
Pli prave ol intence vi parolis.

SEBASTIANO.

Pli saĝe aŭdis vi ol mi esprimis.

GONZALO.

Sinjoro, tial—

ANTONIO.

Fi! malŝparemulo  
De via lango!

ALONZO.

Ŝparu la ceteron.

GONZALO.

Plu mi ne diros, kvankam—

SEBASTIANO.

Li parolos.

ANTONIO.

El ambaŭ li kaj Adriano, kiu  
Unue kokekrios?

SEBASTIANO.

La maljuna!

ANTONIO.

La juna!

SEBASTIANO.

Bone! La garantiaĵo?

ANTONIO.

Ridego!

SEBASTIANO.

Bone!

ADRIANO.

Kvankam la insulo  
Dezerta ŝajnas,—

SEBASTIANO.

(*Ridante*) Ha! ha! mi jam pagis,<sup>[3]</sup>

ADRIANO.

Neloĝigebla, preskaŭ netrafebla,—

SEBASTIANO.

Ĝin tamen—

ADRIANO.

Tamen—

ANTONIO.

Li ĝin tamen trafis.

ADRIANO.

Ĝi devas havi maldensan, delikatan, karesan temperaturon.

ANTONIO.

Temperaturo estis delikata knabino.

SEBASTIANO.

Jes, kaj maldensa, kiel li klerulege klarigis.

ADRIANO.

L' aero tie ĉi elspiras sur nin dolĉege.

SEBASTIANO.

Kiel se ĝi havus pulmojn kiuj estus putrintaj.

ANTONIO.

Aŭ kiel se ĝi estus marĉejodorata.

GONZALO.

Tie ĉi estas ĉio profita por la vivo.

ANTONIO.

Certe, krom rimedoj por vivi.

SEBASTIANO.

Neniaj estas tie ĉi, aŭ almenaŭ tre malmultaj.

GONZALO.

Kiel sufiĉega kaj fortika ŝajnas la herbo! kiel verda!

ANTONIO.

La tero, certe, estas ŝafledkolora.

SEBASTIANO.

Kun iometo da verdo ĉi tie kaj tie.

ANTONIO.

Li nemulte malatingas.

SEBASTIANO.

Ne; li nur tute maltrafis la veron.

GONZALO.

Sed la malofteco de tio, kvazaŭ nekredebla, estas—

SEBASTIANO.

Simila je multaj certigitaj maloftecoj—

GONZALO.

Estas fakto ke niaj vestoj antaŭe ĵus trempitaj en la maro, nun konservas ŝian freŝecon kaj brilecon; ili ŝajnas pli rekolorigitaj ol makulitaj per akvo sala.

ANTONIO.

Se nur unu el liaj poŝoj povus paroli, ĉu ĝi ne dirus: li mensogas?

SEBASTIANO.

Jes, aŭ ke li falsege enpoŝigas sian raporton.

GONZALO.

Ŝajnas al mi ke niaj vestoj estas nun tiel freŝaj kiel ili estis kiam ni unue ilin portis en Afriko, ĉe l' edziĝo de l' belega Neapola reĝidino Klaribelo, je la Reĝo de Tuniso.

SEBASTIANO.

Ho, estis favorega edziĝo, certe, kaj ni multe profitas per ĝi en nia reveno.

ADRIANO.

Tuniso neniam estis riĉigita de tiel modela reĝino!

GONZALO.

Ne, de l' tempo de la vidvino Dido.

ANTONIO.

Vidvino! peston je tio! Kiel tiu vidvino envenas? vidvino Dido! . . .

SEBASTIANO.

Nu! se li ankaŭ dirus “vidvo Aeneo”? Miriga estas via aŭdaĵo!

ADRIANO.

Ĉu “vidvino Dido” vi diris? Vi min rememorigas ke ŝi loĝis en Kartago, ne en Tuniso.

GONZALO.

Tiu ĉi Tuniso, sinjoro, estis Kartago.

ADRIANO.

Kartago?

GONZALO.

Mi tion certigas, Kartago.

ANTONIO.

Lia vorto estas pli kredinda ol la Amfiona harpo.

SEBASTIANO.

Li elkonstruis la muron kaj ankaŭ la domojn.

ANTONIO.

Kian neblaĵon li tuj faros ebla?

SEBASTIANO.

Mi kredas ke li domen enportos tiun ĉi insulon en sia poŝo, kaj ĝin donos al sia filo, kiel pomon.

ANTONIO.

Tiam, dissemante la kernojn en la maro, li naskos multajn aliajn insulojn.

GONZALO.

(Al ADRIANO) Jes<sup>[4]</sup>.

ANTONIO.

Nu! ĉio en ĝia propra tempo.

GONZALO.

(Al ALONZO) Via Reĝa Moŝto, ni ĵus paroladis pri niaj vestoj, kiuj ŝajnas nun tiel novaj kiel ili estis ĉe la edziĝo de via filino, nun reĝino de Tuniso.

ANTONIO.

Kaj la plej maloftulino kiu iam tien iris.

SEBASTIANO.

Ho, esceptu, mi petegas, vidvinon Dido!

ANTONIO.

Ho, vidvino Dido! jes, vidvino Dido!

GONZALO.

Ĉu, sinjoro, mia vesto ne estas tiel freŝa kiel ĝi estis kiam mi unue ĝin portis —mi volis diri preskaŭ . . .

ANTONIO.

Nu, tiu ĉi “preskaŭ” taŭge alvenis.

GONZALO.

Kiam mi ĝin portis dum la edziĝo de via filino—

ALONZO.

Vi tedas mian aŭdon per ripeto  
De vortoj kiuj min senprudentigas!  
Ŝin kial mi edzigis en Afriko  
El kiu revenante filon perdis?  
Kaj ankaŭ ŝin,—nun tiel malproksiman  
De Italujo,—mi ne plu revidos!  
Ho, Ferdinando mia, heredonto  
De Neapolo ankaŭ de Milano,  
Nutraĵon el vi kia stranga fiŝo  
Ĵus faris?

FRANCISKO.

Eble, reĝo, li postvivas:  
Mi vidis, li batalis kun la ondoj  
Kaj ilin rajdis, akvavojon faris,  
Flankpuŝis, bruste kontraŭstaris maron.  
Levante kapon super l' alfluaĵo,  
Li remis brave, per potencaj brakoj,  
Al bordo, kiu por li sin klinigis,  
Helpante l' princon; kaj, sendube, reĝo,  
Li, viva, teron trafis.

ALONZO.

Ne, li mortis.

SEBASTIANO.

Sinjoro Reĝo, vin por ĉio danku!  
Vin, solan kaŭzon de la malfeliĉo.  
Eŭropon nian tiel vi malŝatis  
Ke la filinon donis al Afriko:  
Okuloj ŝiaj povas nun surverŝi  
L' okazon kiun tiel vi preparis.

ALONZO.

Silentu, mi petegas.

SEBASTIANO.

Genufleksoj,  
Petegoj de ni ĉiuj estis vane.  
La belanimulino ŝanceliĝis:  
(Ĉu la malamo, ĉu l' obeo venkos?)  
La princan filon vian ni ĵus perdis . . .  
Vidvinoj Neapolaj kaj Milanaj  
Nun estas pli ol viroj revenantaj.  
La kulpo via—

ALONZO.



Kaj plej granda perdo!

GONZALO.

Sinjur' Sebastiano, la vereco  
El viaj lipoj sonas nek afable  
Nek ĝustatempe; gratas vi la vundon  
Saniĝi bezonantan.

SEBASTIANO.

Prava diro.

ANTONIO.

Kaj bona ĥirurgiaĵo.

GONZALO.

(Al ALONZO) Ni vintriĝas,  
Ho, Reĝo, kiam tiel vi nubiĝas.

SEBASTIANO.

Ni vintriĝas?

ANTONIO.

Jes, ni vintregiĝas!

GONZALO.

Se mi plantisto de l' insulo estus—

ANTONIO.

Ĝin tute kovrus li per sem' urtika.

SEBASTIANO.

Aŭ malvoj, aŭ rumeksoj.

GONZALO.

Se mi reĝo

Ĉi tie estus, kia mi fariĝus?

SEBASTIANO.

Sobrega, certe, ne havante vinon.

GONZALO.

Mi volus en la regno ĉion fari  
Laŭ kontraŭregularo; malpermesus  
Aĉetojn, vendojn, juĝistaron, juĝojn,  
Literaturon, mankon aŭ riĉecon;  
Mi ne permesus servon aŭ heredon,  
Kontrakton, limon, bienposedaĵon,  
Oleon, grenon, metaluzon, oron,  
Vinberkulturon, ian okupadon  
Mi malpermesus. Viroj kaj virinoj  
Nelaboremaj ĉiuj ĉiam estus,  
Sed puraj kaj senkulpaj.—Ne regeco!

SEBASTIANO.

Li de la regno, tamen, estus reĝo!

ANTONIO.

L' unuan diron li forgesas fine.

GONZALO.

Komune kreskus nutro el naturo:  
Nek ŝvito, penoj, perfidaĵ', rabado,  
Nek glavo, ponardego nek tranĉilo,  
Pafilo, nek maŝino nin malhelpus.  
Naturo sola naskus ĉion bonan  
Sufiĉe por nekulpa la popolo.

SEBASTIANO.

Edzeco, tie, ĉu okazus iam?

ANTONIO.

Ne, nur petola, buba vagistado.

GONZALO.

Mi tiel regus kiel en oraĝo.

SEBASTIANO.

Prosperon al la reĝa Moŝto via!

ANTONIO.

Gonzalo longe vivu!

GONZALO.

(Al ALONZO) Reĝo mia . . .

ALONZO.

Ne diru plu, nenion vi parolas.

GONZALO.

Kore mi tiel pensas, Via Reĝa Moŝto; mi tion faris nur por kuraĝigi tiujn ĉi sinjorojn, kies pulmoj, sentemaj kaj viglaj, ĉiam ridas je nenio.

ANTONIO.

Sed, ni ridis je vi mem.

GONZALO.

Kaj, kiel mi estas por vi nenio, vi povas daŭrigi kaj ridi je nenio.

ANTONIO.

Ho, kian frapon li ĵus donis!

SEBASTIANO.

Jes, sed ĝi falis platege.

GONZALO.

Vi ja estas kuraĝagaj sinjoroj; sendube vi povus forlevi la lunon el ĝia sfervojo, se nur ĝi bonvolus daŭri kvin semajnojn senŝanĝe.

(*Venas ARIELO (nevidebla) ludanta solenan arion*).

SEBASTIANO.

Tion ni farus, poste ni irus por birdokapti torĉlume tra l' arbetaĵo.

ANTONIO.

Ne koleru, bona sinjoro.

GONZALO.

Ne, kredu al mi, mi ne riskos tiel malsaĝe mian diskretecon: ĉu vi volus ridigi min por ekdormi? Mi sentas min tre dormema.

ANTONIO.

Ekdormu, kaj aŭskultu nin.

*(Ĉiuj dormas, krom ALONZO, SEBASTIANO kaj ANTONIO).*

ALONZO.

Ho, kiel frue ĉiuj ili dormas!  
Di' volu fermi pensojn kun okuloj:  
Mi volas dormi.

SEBASTIANO.

Ho, sinjoro bona,  
Atentu zorge al l' ofero bena;  
Maloŝte ĝi vizitas malfeliĉon,  
Sed kvietigas kiam ĝi alvenas.

ANTONIO.

Ni du, sinjoro, zorgos dum vi dormos,  
Gardante vin.

ALONZO.

Dankegon! mi ekdormas . . .

*(Dormas ALONZO. ARIELO foriras).*

SEBASTIANO.

Rigido stranga ilin tute kaptis.

ANTONIO.

La eco de l' klimato.

SEBASTIANO.

Sed mi miras

Ke ĝi ne kaptis nin. Mi min ne sentas  
Dormema.

ANTONIO.

Ankaŭ mi min sentas vigla.

El ili ĉiu falis konsenteme,  
Rigide, kvazaŭ fulme kunfrapita . . .  
Okazus kio? . . . Nun, Sebastiano,  
Okazus kio? Ne, mi plu ne diros . . .  
Mi tamen vidas en via vizaĝo  
Ke vi fariĝus tio—La okazo  
Alvokas vin, kaj mia fantazio  
Ekvidas kronon sur la kapo via!

SEBASTIANO.

Ĉu vi ne songas?

ANTONIO.

Diri vi min aŭdis.

SEBASTIANO.

Mi aŭdis vin, kaj certe, dorma diro  
Parolo via en l' orelo sonis.  
Nu, kion diris vi?—Kiela dormo!  
Okuloj malfermitaj, parolanta  
Staranta, moviĝanta, sed dormanta!

ANTONIO.

Sebastiano, vian ŝancon kaptu!  
Ne palpebrumu, sed vekigu tute!

SEBASTIANO.

Vi ronkas klare, kaj signifo estas  
En via ronko.

ANTONIO.

Mi, pli serioza  
Ol ofte, nun deziras, vi imitu  
La faron mian. Se vi tiel agos,  
Vi estos tuj triobla.

SEBASTIANO.

Senmovakve,  
Mi nun atendas.

ANTONIO.

Sed mi vin instruos  
Por ke vi flui povu.

SEBASTIANO.

Tion faru;  
Alfluon donu al hereda nulo.

ANTONIO.

Ho, se vi povus, kiel vi la planon  
Aprobus, kvankam ĝin vi tiel mokas:  
Ĝin flankigante, vi ĝin pligrandigas.  
Alfluantuloj ofte marfundiras  
Per timo, eble per mallaboreco!

SEBASTIANO.

Daŭrigu, ĉar mieno via montras  
Gravaĵon el vi pretan por naskiĝi,  
Penantan por klareco.

ANTONIO.

Nu, sinjoro,

Francisko l' reĝon preskaŭ ĵus konvinkis  
Ke lia filo Ferdinando vivas—  
(Li konvinkiga homo ĉiam ŝajnis)  
Memoro lia pli ne estas taŭga  
Ol tiu de mortinto.—Ferdinando?  
Kredeble ke li estus ne droninta,  
Kaj tiu dormantulo naĝas.

SEBASTIANO.

Certe,

Ke li ne dronis, mi ne pensas.

ANTONIO.

Bone!

Nepenso tia esperegon donos.  
Nepenson sekvos tia altespero  
Ke ambicio preter ne forpasos.  
Konsentas vi ke la reĝido mortis . . .

SEBASTIANO.

Certege.

ANTONIO.

Kiu do la kronon havos  
Post nuna l' reĝo?

SEBASTIANO.

Estos Klaribelo.

ANTONIO.

Ŝi estas nun reĝino de Tuniso;  
Ŝi loĝas mejlojn for de homa vivo;  
Novaĵon Neapolan ŝi ricevi  
Ne povus, krom se l' suno poŝtfariĝus!  
(La lunloĝanto estus tro malfrua) . . .  
Ĝis novnaskitoj estos jam razeblaj . . .  
Ni, revenante de ŝi, marglutitaj,

Krom la malmultaj kiujn sorto savis  
Nur por l' agado, sekvo d'estinteco,  
Ni baldaŭ ambaŭ faros . . .

SEBASTIANO.

Sensencaĵon

Vi diras; certe la princino reĝa  
Reĝin' Tunisa estas: Neapolo  
Forestas de Tuniso . . .

ANTONIO.

L' interspaco

Enhavas mejlojn, kiuj ŝajnas diri:  
“Neniam Klaribelo nin repaŝos;  
“Ŝi restu en Tuniso: Neapolo  
“Proklamu tuj Sebastianon reĝon.”  
Supoze ke l' dormantoj tute mortis,  
Ĉu ili ne similaj tiam estus?  
Neapolanojn iu povas regi  
Eĉ tiel bone kiel dormemulo.  
Sinjoroj vivas kiuj babiladus  
Amplekse, tiel kiel eĉ Gonzalo;  
Mi eĉ imiti povus lin per ŝercoj  
Sensencaĵoj ĉiam kaj profunde tedaj.  
Ho! kial vi ne kiel mi posedas  
Kuraĝon? Kia dormo estus tio  
Por via altiĝeco! Ĉu vi sentas?

SEBASTIANO.

Mi iom sentas.

ANTONIO.

Ĉu kontento via  
Ne la sukceson helpos?

SEBASTIANO.

Mi memoras,



Ke propran fraton vian vi forigis.

ANTONIO.

Nu, do, rigardu, kiel al mi bone  
La duka vesto taŭgas! ja, pli bone  
Ol la antaŭa—De Prospero estis  
La sekvantaro egaluloj miaj—  
Nun, ili servas min.

SEBASTIANO.

Sed konscienco . . .

ANTONIO.

Nu! kie kuŝas tio? Se ĝi estus  
Piedabsceso, portus mi pantoflon;  
Sed mi ne sentas, ke diaĵo tia  
En mia brusto loĝas: se dudeko  
Da konsciencoj pro Milano starus  
Al mi kontraŭaj, mi kandigus ilin  
Aŭ fandus, antaŭ ol min mordus ili,  
Jen estas via frato—li ne ŝajnas,  
Pli ol la ter' portante lin, agema—  
Se tio, kio ŝajnas, li nun estus—  
Mortinta—kaj, per glavaj nur tri coloj,  
Eterne dormi povas mi lin igi—  
Dum vi, simile, tiun grizbarbulon  
Al la senfina dormo povus sendi,  
Por ke, de nun, li ne plu al ni tedu . . .  
Pri la ceteraj . . . de ni ili prenos  
Konduton sian kiel kato lakton,  
Kaj tion diros, kion ni demandos:  
Aprobos ĉion ili.

SEBASTIANO.

Vin, karulo,  
Imitos mi, kaj kiel vi Milanon,  
Mi Neapolon gajnos. Glavon tiru!

Vin frapo liberigos de depago,  
Kaj, reĝo via, mi vin amos.

ANTONIO.

Kune

Ni frapu, kiam mi la manon levos . . .  
Vi al Gonzalo.

SEBASTIANO.

Ha! nur unu vorton. (*Ili paroladas mallaŭte*).  
(*Muziko aŭdata. Revenas ARIELO, nevidebla*).

ARIELO.

Magie mia mastro antaŭvidas  
Danĝeron minacantan vin, Gonzalo:  
L' aferon mi kunhelpos, vin savante.

(*Kantas ĉe l' orelo de GONZALO*).

*Tie ĉi, dum vi ronkadas,  
Konspirantoj kuninsidas:  
Leviĝu, leviĝu!  
Se vi amas vian vivon,  
Mi vin veki faros devon:  
Vekiĝu! vekigiĝu!*

ANTONIO.

Nun, ni rapidu!

GONZALO.

(*Vekiĝas*) Ho! anĝeloj bonaj,  
La Reĝon savu!

(*Ĉiuj vekigiĝas*).

ALONZO.

Kion? ho! vekigiĝu!

Vi kial estas glavtiritaj? Diru!  
Mieno via kial terurita?

GONZALO.

Okazis kio?

SEBASTIANO.

Dum ni ambaŭ zorgis  
Ripozon vian', ni ĵus aŭdis bruon  
Mallaŭtan, al la bovablek' similan,  
Aŭ leonbleko. Ĉu vin ĝi ne vekis?  
Terure sonis ĝi.

ALONZO.

Mi ĝin ne aŭdis.

ANTONIO.

Bruado taŭga por timigi monstron  
Aŭ tertremigi; al mi eĉ verŝajnis  
Muĝado de la tuta leonaro.

ALONZO.

Gonzalo, ĉu vi tion aŭdis?

GONZALO.

Vere

Mi zumon aŭdis, kiu sonis strange,  
Eĉ vekis min, kaj, Reĝo, mi vin tuŝis,  
Ekkriis, kiam vidis mi la glavojn . . .  
Bruado estis certe, ni bezonos  
Nin gardi, aŭ ĉi tiun lokon lasi.  
Ni glavojn niajn tiru.

ALONZO.

Ni foriru,  
Por ree serĉi malfeliĉan filon.

GONZALO.

De bestoj tiaj gardu lin Ĉielo,  
Ĉar sur l' insulo loĝas li.

ALONZO.

Antaŭen! (*Ili foriras*).

ARIELO.

Prospero, mia mastro, tuj sciiĝos  
Elfaron mian: Reĝo, filon serĉu. (*Foriras*).

## Sceno 2.—*En alia parto de l' insulo.*

(*Venas KALIBANO portante lignan ŝarĝon. Tondra bruado aŭdata*).

KALIBANO.

Infektoj elsorbitaj de la suno,  
El lokoj marĉaj, ŝlimaj, kotaj, falu  
Nun sur Prosperon, kaj lin malsanigu!  
Devigu li min ĉie lin malbeni . . .  
Spiritoj liaj—kvankam ili aŭdas—  
Nek pinĉos, nek kbolde min timigos,  
Nek erarlume tiros min en ŝlimon,  
Nur se ordonos li—Sed, pro nenio  
Li sur min ĵetas ilin: ĉu simie  
Grimacas ili, blekas, foje mordas;  
Ĉu erinace falas en la vojon,  
Pikante la piedojn; ĉu kolubre  
Min vundas, aŭ freneze al mi siblas! . . .  
Ha! . . . nun, al mi spirito de li venas!  
Ĉu malrapide mi alportas lignon?  
Se plate falos mi, ĉu ĝi min vidos? (*Sin kuŝigas*).

(*Venas TRINKULO*).

TRINKULO.

Tie ĉi estas nek arbitaĵo, nek eĉ arbito por elporti malbonan veteron, kaj alia fulmotondro pretiĝas; mi tion aŭdas kantegi tra la vento; tie ĉi la sama nigra nuboj, tie unu grandega, kiu ŝajnas kiel terura bombardilo, bezonanta elverŝi sian fluidaĵon. Se tondros kiel antaŭe, mi ne scias, kie mi povos ŝirmi la kapon: certe, tiu nuboj nur povas pluvi sitelege! (*Ekvidante Kalibanon*) Hoj! kio kuŝas tie ĉi? Homo aŭ fiŝo? Viva aŭ malviva? Fiŝo! Ĝi fiŝe flaras; tre malnova kaj fiŝa flaro; ia gado, ne tre freŝa. Stranga fiŝo! Se, kiel antaŭe, mi nun loĝus en Anglujo, kaj povus pentrigi tian fiŝon, ne ekzistas naivegulo tie, kiu, en libertempo, bonvole ne donus arĝentan moneron por ĝin vidi; tie, stranga besto famigas homon. Tie, kiam eĉ doiton<sup>[5]</sup> oni ne volus doni por helpi laman almozulon, oni tuj donas dek doitojn por vidi malvivan Indianon . . . Ĝi estas krurigita kiel homo, kaj ĝiaj naĝiloj ŝajnas kiel brakoj . . . Per mia vereco! mi ellasas kaj ne konservas plu mian unuan opinion pri ĝi; ĝi ne estas fiŝo, sed unu el la insulanoj, kiu, kredeble, antaŭ ne longe, suferis de fulmofajro. (*Tondra bruoj*). Ho ve! la fulmotondro revenas: mia plej saĝa rimedo estos rampi sub lian kitelegon; nenie estas alia rifuĝejo: mizero konatigas homon kun strangaj kunkuŝantoj. Mi tie envolvos min, ĝis la feĉo de l' pluvego estos pasinta.

(*Venas STEFANO kantante; li havas botelon en mano*).

STEFANO.

*Mi ne plu iros al la maro:  
Mi mortos ĉe la landanaro.*

Nu, tio ĉi estas mizera kanto, taŭga por enterigo. Sed, jen estas mia konsolilo. (*Trinkas*).

(*Kantas*).

*La estro, frotisto, subestro, eĉ mi,  
La paflegist', la helpisto,  
Marinjon, Margenjon, amindumis ni,  
Sed ne por Katenjo amisto!  
Ĉar havis ŝi langon frapiston,  
Ne ŝatis ŝi homon mariston,  
Nek peĉo, nek gudro por ŝi—  
(Kie jukiĝis*

*Ŝi mem gratiĝis)*  
*Al maro! bravuloj, sen ŝi iru ni!*

Tio ĉi ankaŭ estas mizera kanto, sed . . . jen estas mia konsolilo.

*(Trinkas).*

KALIBANO.

Ne turmentu min: haj!

STEFANO.

Kio estas tio? Ĉu diablojn ni havas tie ĉi? Ĉu volas ili kapti nin per sovaĝuloj kaj Indianoj? Ha! mi ne ĵus foriris de dronado por ke viaj kvar kruroj min timigu! Ĉar, kiel dirite, Viro kiu kvarkrure marŝas, ne povas lin forstarigi'. Nu! dum Stefano spiros tra siaj naztruoj, tion oni ree diros.

KALIBANO.

La spirito min turmentas: ho! . . .

STEFANO.

Tio ĉi estas kvarkrura insula monstro: ĝi ankaŭ havas febron, mi pensas. Sed, per la diablo, kie ĝi lernis nian lingvon? Mi kuracon donos al ĝi, eĉ nur pro tio. Se mi povos ĝin resanigi, malsovaĝigi, kaj kune kun ĝi trafi Neapolon, ĝi estos donaco taŭga por ĉia imperiestro, kiu iam starus en ledaj ŝuoj.

KALIBANO.

Ne turmentu min, mi petegas; mi pli rapide hejmen alportos la lignon.

STEFANO.

Ĝi nun malsaniĝas, kaj ne tre saĝe parolas. Ĝi tuj gustumos el mia botelo. Se ĝi neniam antaŭe trinkis vinon, tio, kredeble, forigos ĝian malsanon. Se mi povos tute resanigi ĝin kaj konservi ĝin malsovaĝe, mi troan monon ne postulos por ĝi, sed kiu ĝin aĉetos, tiu pagos por ĝi taŭge.

KALIBANO.

Vi ankoraŭ ne tre dolorigas min, sed, post ne longe, tion vi faros; mi tion ekvidas per via tremo: nun, Prospero tuj agos ĉe vi.

STEFANO.

Jen estas la maniero! Malfermu la buŝon: jen estas tio, kio vin paroligos, kato. Malfermu vian buŝon; tio ĉi ŝanceligos vian ŝanceliĝon, kaj bonege, mi certigas. Vi ne konas tiun, kiu estas via bonfaristo. Ree malfermu vian faŭkon!

TRINKULO.

Ŝajnas al mi, kvazaŭ mi konus tiun voĉon! Ĝi eble . . . sed ne! li ĵus dronis . . . Tiu ĉi ĉiuj estas diabloj . . . Di' gardu min! . . .

STEFANO.

Kvar kruroj kaj du voĉoj! Mirinda monstro! Ĝia antaŭa voĉo servas por bonparoli pri ĝia amiko; ĝia malantaŭa voĉo por elparoli malpurajn vortojn kaj kalumnion. Se la vina enhavo de mia botelo povos resanigi ĝin, mi ĝian febron kuracos. Nun, amen!<sup>[6]</sup> Mi tuj verŝos iom en vian alian buŝon.

TRINKULO.

Stefano! . . .

STEFANO.

Ĉu via alia buŝo vokis al mi? . . . Di' kompatu! kompatu! . . . Tio ĉi estas ne monstro sed diablo! Mi tuj forlasos ĝin; mi ne posedas longan kuleron!<sup>[7]</sup>

TRINKULO.

Stefano! (se vi vere estas Stefano!) Tuŝu min kaj parolu al mi, ĉar mi estas Trinkulo—(ne timu!)—via bona amiko Trinkulo!

STEFANO.

Se vi estas Trinkulo, elvenu! . . . Mi detiros vin per la malpli longaj kruroj; se iaj el ili apartenas al Trinkulo, tiuj ĉi estas ili. Vi ja estas Trinkulo mem. Kiel okazis tio, ke vi fariĝis dorso al tiu ĉi monstro?

TRINKULO.

Mi pensis ke ĝi estis mortigita per fulmofajro. Sed, ĉu vi mem ne ĵus dronis, Stefano? Mi nun esperas, ke vi ne dronis. Ĉu la fulmotondro estas pasinta?—Mi min kaŝis sub la kitelego de l' monstro pro timo de la fulmotondro. Ho; ĉu vi tamen estas viva, Stefano? Ho, Stefano! du Neapolanoj savitaj!

STEFANO.

Ne tro puŝu min, mi petas; mia stomako ne tre firme agas.

KALIBANO.

Belaĵoj, tiuj ĉi! Ĉu ne spiritoj? . . .  
Mi genufleksu al vi, dio brava,  
Pro la likvoro inda je ĉielo!

STEFANO.

Kiel vi foriris? Kiel vi venis tien ĉi? Ĵuru, per tiu ĉi botelo, kiel vi tien ĉi venis! Per tiu ĉi botelo (kiun mi faris el arboŝelo, per miaj propraj manoj, post kiam mi estis trafinta la bordon) mi mem fornaĝis sur barelo da kanarivino, kiun la maristoj elĵetis al la maro.

KALIBANO.

Mi tuj ĵuros, per tiu botelo, ke mi fariĝos via fidela subulo, ĉar ne terdevena estas la likvoro.

STEFANO.

(Al TRINKULO) Tien ĉi! Ĵuru do kiel vi foriĝis.

TRINKULO.

Karulo, mi naĝis al la bordo, kiel anaso. Mi povas naĝi kiel anaso; tion mi ĵuras!

STEFANO.

Nu! kisu la libron!<sup>[8]</sup> Kvankam vi povas kiel anaso naĝi, vi tamen havas la mienon de ansero.



TRINKULO.

(*Trinkinte*) Ho, Stefano! Ĉu pli da tio ĉi estas?

STEFANO.

Tutan barelon mi havas, maljunulo. Mia kelo sidas en ŝtonego ĉe l' marbordo, kie mia vino estas kaŝita. Nun, monstro, kiel kuraciĝas la febro?

KALIBANO.

Ĉu ne falis vi de la Ĉielo?

STEFANO.

De la luno, mi certigas. Mi iam estis lunloĝanto, dum kelka tempo.

KALIBANO.

Mastrino montris vin, la hundon, l' arbitaĵon;  
Mi vidis vin en ĝi, kaj vin mi nun adoras!

STEFANO.

Bonege! tion ĵuru! kisu la libron.<sup>[9]</sup> Mi tuj replenigos ĝin per nova enhavo!  
ĵuru!

TRINKULO.

Per la sunlumo! tio ĉi estas naivega monstro! Ĉu mi ĵus timiĝis pro ĝi?  
Malsprita monstro! La lunloĝanto! ha! ha! Kia kredema monstro! Bone vi suĉis, monstro, vere.

KALIBANO.

Mi ĉiun fruktan colon sur l' insulo montros:  
Piedon vian kisu mi! Di' estu mia.

TRINKULO.

Per la taglumo! Perfidega kaj drinkema monstro! Kiam ĝia dio dormos, ĝi de li ŝtelos la botelon.

KALIBANO.

Mi tuj kisos vian piedon; tuj via subulo mi mem ĵuros.

STEFANO.

Venu do; genufleksu kaj ĵuru!

TRINKULO.

Mi mortiĝos per rido je tia azenidkapa monstro. Kia malestimebla monstro!  
Mi preskaŭ volus ĝin bati . . .

STEFANO.

(Al KALIBANO) Venu! kisu.<sup>[10]</sup>

TRINKULO.

. . . nur ke la mizera monstro estas ebria. Abomena monstro!

KALIBANO.

Mi fontojn montros, mi eltrovis berojn,  
Por vi fiŝkaptos, kaj alportos lignon.  
Ho! peston al tirana mastro mia!  
Mi ne lin servos plu, sed vin mi sekvos,  
Ho, mirigulo!

TRINKULO.

Monstro ridindega! ĝi faras mirindaĵon el malnobla drinkulo!

KALIBANO.

Vin mi kondukos kie la pomarboj  
Fruktege kreskas—Per ungegoj miaj  
Elfosos trufojn, garolneston montros,  
Kaj vin instruos por sciuron trafi,  
Mi vin trovigos la avelarbaron,  
Kaj foje sur ŝtonego mevojn kaptos . . .  
Ĉu vi nun volas veni?

STEFANO.

Ho, mi petas,

Antaŭen tuj, kaj plu ne vorton diru.

Trinkulo, ĉar la reĝo kune kun niaj aliaj kunmarveturantoj ĉiuj dronis, ni tie ĉi heredos. (Al KALIBANO) Portu mian botelon. Post ne longe, kunfrato Trinkulo, ni ĝin replenigos.

KALIBANO.

(*Kantas ebriule*) Adiaŭ, mastro, mastro, adiaŭ.

TRINKULO.

Monstro blekeganta! Drinkema monstro!

KALIBANO.

(*Laŭte kantas*).

*Mi por fiŝo ne plu faros digon,*

*Nek alportos lignon,*

*Nek ĝin eĉ ekfajros,*

*Nek pletegon gratos,*

*Nek teleron lavos!*

*Ban! ban! ban! Ka-Kalibano, kantu:*

*Novan mastron amu,*

*Ne tiranon timu!*

(*Ekkriante*) Libereco! he! ho! Libereco! libereco! he! ho! libereco!

STEFANO.

Ho, brava monstro, nun, antaŭen marŝu!

(*Ili foriras*).

## Akto III.

### Sceno 1.—*Antaŭ la ĉambreto de PROSPERO.*

(*Venas FERDINANDO portanta ŝtipon.*)

FERDINANDO.

Labora ludo havas ĉarmon agan;  
Humila tasko rekompencon celas.  
Mizera estus mia nuna stato,  
Se la mastrino, kiun mi obeas,  
Al koro mia ne redonus vivon;  
Ŝi, dolĉulino, penon plezurigas.  
Dekoble por mi estas ŝi pli bona  
Ol ŝia patro maldolĉema ŝajnas:  
Li min devigas, per kruela povo,  
Alporti milojn da ŝtipecoj tie  
Kaj altan mason per ĉi tiuj fari.  
La karulino—kiam ŝi min vidas  
Sub peza ŝarĝo pene laciĝantan  
Plorege diras: Humilega tasko  
“Faranton havis noblan pli, neniam.”  
Forgesas mi: sed tiuj dolĉaj pensoj  
Laboron ĉarmas kaj l’ animon mian  
Pli okupadas, ol fortuzo korpon.

(*Venas MIRANDO, kun PROSPERO malproksime.*)

MIRANDO.

Ho ve! mi petas, tiel ne penadu!  
Ke Dio volu per la fulmofajro  
Bruligi ŝtipojn ĉiujn kolektotajn!  
Demetu tion; tie ĉi ripozu.  
La ŝtipoj ploros kiam ili brulos,

Ĉar ili vin lacigis. Mia patro  
Atente legas nun; mi petas, sidu:  
Ne trudos li vin dum de nun tri horoj.

FERDINANDO.

Mastrino kara! eĉ la sun' subiros  
Hodiaŭ, antaŭ ol mi povos fari  
La taskon devigitan.

MIRANDO.

Se vi volas  
Sidiĝi tie, mi la ŝtipojn portos.  
Demetu tion kaj al mi tuj donu:  
En mason ĝin mi lokos.

FERDINANDO.

Ne, karega!  
Preferus mi muskolojn miajn kraki,  
Aŭ spinon rompi ol vin vidi tiel  
Humile penadantan, dum mi sidus  
Mallaboreme.

MIRANDO.

Al mi bone decus;  
Ja, kiel al vi tiel:—pli facile . . .  
Ĉar estus en l' afero mia volo,  
Sed ne la via.

PROSPERO (*flanken*).

Ina kreitaĵo!  
Vin ankaŭ trafis nun, l' aminfektado!

MIRANDO.

Vi ŝajnas laca.

FERDINANDO.

Ne! mastrino nobla,  
Por mi la nokto ŝajnas la mateno  
Se staras vi proksime. Mi petegas—  
Precipe ke preĝante mi ĝin povu  
Esprimi—diru al mi vian nomon!

MIRANDO.

Mirando. (*Flanken*) Patro mia, mi forgesis:  
Kaŝitan tion ĉi vi volus gardi.

FERDINANDO.

Mirando! plej el ĉiuj admirinda!  
Plej kara el plej karaj tra la mondo!  
Multegajn sinjorinojn mi ekvidis:  
Tre ofte eĉ belsona ina voĉo  
Sklavigis tro atentan mian aŭdon;  
Pro multaj ecoj mi virinojn ŝatis;  
Neniam tamen trovis mi animon  
Perfektan tiel, ke malbono ia  
Ĉarmegan virton en ŝi ne malhelpis,  
Aŭ ĝin surstrekis. Sed vi, ho! vi sole  
Perfekta staras; senegalulino,  
Vi el plej bona kreitaĵ' devenas.

MIRANDO.

Neniun el la mia seks' vidante,  
Vizaĝon inan nun mi ne memoras  
Krom mia, kiam vidas en spegulo.  
El viroj, kiujn mi jam povus nomi,  
Nur vi, amiko, kaj la patro kara  
De mi konataj estas: eksterulojn  
Neniam mi ekvidis por kompari  
Al iu la alian—Modesteco  
La plej ŝatita, for de mi, juvelo!—  
Mi kunvivanton, krom vi, ne dezirus,  
Nenian formon mi imagi povas  
Ol via pli amindan. Iom vage

Mi babiladas, kaj la patran leĝon  
Per tio mi forgesas.

FERDINANDO.

Karulino!

Reĝido mi naskiĝis; Dio gardu,  
Sed, mi nun eble eĉ jam Reĝo estas!  
Mi do sklavecon tian ne elportus  
Pli dolĉe ol la lipo tabanpikon . . .  
Mirando! la animon mian aŭdu!  
Tuj kiam vin mi vidis, mia koro  
Eksaltis por vin servi, ĉe vi loĝas . . .  
Kaj mi, la sklavo ĝia, pro vi, sole,  
Ŝtipegojn portas nun.

MIRANDO.

Ĉu vi min amas?

FERDINANDO.

Ĉielo! tero! estu atestantoj  
Al mia diro, se ĝi estas vera:  
Se ne sincera, en mi mem nuliĝu  
Plej karaj la esperoj! Jes, Mirando,  
Mi, super ĉiuj limoj de parolo  
Vin amas, ŝatas, kaj honoras.

MIRANDO (*plorante*).

Tamen,

Je tio tiel bona mi ekploras.

PROSPERO (*flanken*).

Renkonto taŭga de du noblaj koroj!  
Sur tion, kio inter ili venos,  
Ĉielo, pluvu benon!

FERDINANDO.

Kial plori?

MIRANDO.

Ĉar mi ne estas inda, . . . ne maltimas  
Donaci kion mi oferi volus . . .  
Eĉ malpli preni mian koran vivon!  
Sense tamen veron kaŝi estus:  
Ju pli kaŝita, des pli ĝi montriĝas.  
For de mi do, kaŝema honto, iru;  
Instruu min, vi, sankta senkulpeco!  
Edzino via estos mi bonvole,  
Kun mi edziĝi kiam vi deziros,  
Aŭ mortos mi nur via servistino.  
Min kunegalan povus vi rifuzi,  
Sed vin mi servos, laŭ aŭ kontraŭ volo.

FERDINANDO.

Mastrino mia estus: mi vin servu!

MIRANDO.

Ĉu kiel edzo mia?

FERDINANDO.

Jes! pli kore  
Ol sklavo iam liberecon volis!  
Jen mian manon!

MIRANDO.

Kaj vi, mian prenu  
Kun koro en ĝi . . . Ĝis ne longa tempo,  
Adiaŭ, nun!

FERDINANDO.

Miloble mil adiaŭ!

(FERDINANDO kaj MIRANDO foriras).

PROSPERO.



Min tio ne ĝojigas kiel ilin  
Per amo ĵus kaptitajn—Sed pli ĝoja  
Ĝi igas min ol ĉio ajn en vivo—  
Nun mia libro devas min konsili:  
Ankoraŭ mi por fari multon havas  
Eĉ antaŭ vespermanĝo.

(*Foriras*).

## Sceno 2.—*En alia parto de l' insulo.*

(*Venas KALIBANO portante botelon, STEFANO kaj TRINKULO*).

STEFANO.

Ne parolu tiel: kiam la barelo estos senenhava, ni trinkos akvon, sed nenian guton antaŭe; tial, staru kaj maltime marŝu. Servantmonstro, drinku al mi!

TRINKULO.

“Servantmonstro!” kia insula petoleco! Oni diras, ke nur kvin loĝantoj estas sur l' insulo; ni estas tri el ili: se la du aliaj estas tiel cerbigitaj kiel ni, la ŝtato ŝanceliĝos.

STEFANO.

Drinku, servantmonstro, kiam mi ordenas: viaj okuloj preskaŭ ŝajnas kiel se ili sidus en via kapo!

TRINKULO.

Nu, kie ili do estus, alie? Brava monstro estus ĝi, vere, se ĝi havus okulojn en ĝia vosto.

STEFANO.

Mia monstro dronigis sian langon en kanarivino. Miavice, la maro ne povas min dronigi. Per tiu ĉi lumo! mi naĝis, antaŭ ol mi atingis la bordon, tridek-kvin mejlojn, kun intertempoj . . . Vi estos mia leŭtenanto, monstro, aŭ mia gardstaranto.

TRINKULO.

Via leŭtenanto, se vi volas; sed, certe, ĝi ne estas staranto.

STEFANO.

Ni ne kuros, Monsieur Monstro.

TRINKULO.

Certe, kaj ankaŭ vi ne iros, sed enŝlimiĝos aŭ, kiel hundoj, ternestiĝos en kelka angulo.

STEFANO.

Unuafoje en via vivo, parolu, malspritulo, se vi estas bona monstro.

KALIBANO.

La ŝuon leku mi de Via Moŝto:

Lin<sup>[11]</sup> mi ne servos; li ne estas brava.

TRINKULO.

Vi mensogas, malkleregata monstro; mi nun estas taŭga por policano. Kiel! vi, diboĉama fiŝo! Ĉu estis iam ia timemulo, kiu drinkis tiom da vino, kiom mi hodiaŭ? Ĉu monstran mensogon diras vi, kiu nur estas duonfiŝo kaj duonmonstro?

KALIBANO.

Jen! kiel li mokas min! Ĉu vi permesas tion, landsinjoro?

TRINKULO.

“Landsinjoro!” ĝi diras; ke monstro povas esti tiel malsprita!

KALIBANO.

Jen! jen! ankoraŭ! mordu lin morte, mi petas!

STEFANO.

Trinkulo, detenu vian langon. Se vi fariĝos ribelanto, la proksima arbo . . .  
La honesta monstro estas mia subulo, kaj ĝin neniu insultu!

KALIBANO.

Dankon al nobla mia mastro! Ĉu vi bonvolus min aŭdi denove, pri la peto kiun mi jam faris?

STEFANO.

Certe, mi volas. Genufleksu, kaj ĝin rediru. Mi staros kune kun Trinkulo.

(*Venas ARIELO, nevidebla*).

KALIBANO.

Kiel mi antaŭe diris al vi, mi estas la subulo de tirano, sorĉisto, kiu magie ŝtelis de mi la insulon.

ARIELO.

Vi mensogas.

KALIBANO (*al TRINKULO*).

Simia mokemulo, vi mensogas!  
Ke mia mastro volu *vin* mortigi!  
Mi ne mensogas.

STEFANO.

Trinkulo, se vi ankoraŭ tedos al ĝi, dum ĝia rakonto per tiu ĉi mia pugno!  
mi elrompos kelke da viaj dentoj!

TRINKULO.

Kion do? mi nenion diris.

STEFANO.

Sufiĉe! silentu. (*Al KALIBANO*) Daŭrigu!

KALIBANO.

Mi diras, ke magie tiun ĉi insulon  
Li de mi ŝtelis: se la Via Moŝto  
Min volas venĝi, vi la povon havas . . .  
Sed ne ĉi tiu timegulo.<sup>[12]</sup>

STEFANO.

Certe.

KALIBANO.

Vi estos insulestro: mi vin servos.

STEFANO.

Nu! kiel tio fariĝos? Ĉu vi al la individuo povas min konduki?

KALIBANO.

Jes, jes, sinjoro mia, lin dormantan  
Liveros mi al vi, kiam vi povos  
En lian kapon najlon martelumi.

ARIELO.

Vi mensogas; vi ne povas.

KALIBANO (*al* TRINKULO).

Skorbute makulkolorita besto!  
Lin, mastro, multe batu, mi petegas!  
Kaj de li prenu dian la botelon,  
Por ke li poste nur marakvon trinku;  
Ĉar la fontetojn al li mi ne montros.

STEFANO.

Trinkulo, ne ludu kun danĝero plie: se unu vorto via ankoraŭ interrompos la  
monstron, per tiu ĉi mia mano! mi tuj forpelos malseverecon kaj gadon  
faros el vi.

TRINKULO.

Kial? Kion mi faris? Mi faris nenion. Mi pli malproksime tuj staros.

STEFANO.

Ĉu vi ne ĵus diris, ke ĝi mensogas?

ARIELO.

Vi mensogas!

STEFANO (*batas* TRINKULO).

Ĉu mi ankaŭ mensogas? Prenu tion! Se vi tion amas, diru ree, ke mi mensogas.

TRINKULO.

Mi tion neniam diris. Vi estas frenezulo kaj ankaŭ surdulo.—Peston al via botelo! Tion vindrinkado povas kaŭzi!—Epidemion al via monstro, kaj la diablo forprenu viajn fingrojn!

KALIBANO.

Ha! ha! ha!

STEFANO.

Nun, daŭrigu vian rakonton. (*Al* TRINKULO) Mi petas, staru for de ni.

KALIBANO.

Sufiĉe vi lin batu; post ne longe,  
Mi, ankaŭ, tuj lin batos.

STEFANO (*al* TRINKULO).

Nu, for staru.

(*Al* KALIBANO) Daŭrigu.

KALIBANO.

Kiel mi antaŭe diris,

Kutime li<sup>[13]</sup> en posttagmezo dormas:

De li preninte librojn, tuj vi povos  
Lin sencerbigi; aŭ, per dika ŝtupo,  
Premegi la kranion; aŭ elŝuti  
Intestojn liajn, per borega vundo;  
Aŭ, per tranĉilo, gorgon lian tranĉi.  
Memoru, tamen, ŝteli liajn librojn;  
Sen tiuj kiel mi li malspritiĝos,  
Kaj ne spiritojn povos li komandi:

Prosper' de ĉiuj estas malamata  
Simile de mi. Brulu do la librojn.  
Li ankaŭ belajn havas bonajn ilojn,  
Per kiuj domon povas li ornami:  
Filinon tiel belan li posedas  
Ke ŝin li nomas "senegalulino."  
Nur du virinojn jam ĝis nun mi vidis,  
Ŝin, kaj patrinon mian Sikorakso.  
Sed Sikorakson ŝi superas kiel  
Bonego malbonegon.

STEFANO.

Belulino!

KALIBANO.

Jes, landsinjoro, taŭga kunulino  
Por Via Moŝto, kaj idaron noblan  
Ŝi naskos, kiam vi kun ŝi edziĝos.

STEFANO.

Monstro, tiun ĉi viron mi mortigos. Lia filino, kune kun mi, estos Reĝo kaj  
Reĝino (Di' savu nin!) Kaj Trinkulo kaj vi mem estos vicreĝoj.—Ĉu vi  
amas la konspiron, Trinkulo?

TRINKULO.

Bonege!

STEFANO.

Donu al mi vian manon; mi bedaŭras, ke mi vin batis, sed, dum vi vivos,  
ĉiam posedu sobran langon en via buŝo.

KALIBANO.

Post duonhoro dormos la tirano:  
Ĉu vi detruos lin?

STEFANO.

Jes, per honoro!

ARIELO.

Mi tion diros tuj al mastro mia.

KALIBANO.

Vi min gajigas, min plezur' plenigas:  
Ni ronde kantu, kaj petole dancu!

STEFANO.

Kiel vi volos, monstro. Mi akceptas vian proponon. Venu, Trinkulo, ni kantu!

(*Kantas*) Moku, kaj pelu, remoku, repelu;  
Liberaj ni!

KALIBANO.

Tio ne estas la ario.

(*ARIELO ludas la arion per tambureto kaj ŝalmo*).

STEFANO.

Kio estas tio?

TRINKULO.

Tio estas la ario de mia rondkanteto, ludata per la pentraĵo de Neniu.

STEFANO.

Se vi estas viro, aperu en via simileco; se vi diablo estas, faru kion vi volos.

TRINKULO.

Pardonu Di' pekojn miajn!

STEFANO.

Mortante, viro ĉiujn ŝuldojn pagas:  
Mi vin maltimas . . . (Min pardonu Dio!)

KALIBANO.

Ĉu timas vi?

STEFANO.

Ne, monstro, mi ne timas.

KALIBANO.

Ne timu: plena je bruadoj strangaj  
L' insulo estas; sonoj dolĉariaj,  
Ĉarmegaj, kiuj ne malbonon faras.  
Ho, foje, ventaj, kordaj muzikiloj  
Milope ludas; dolĉaj voĉoj kantas, . . .  
Dormantan min tuj vekas, . . . redormigas, . . .  
Grandegaj songoj malfermante nubojn,  
Belecon montras pretiĝante fali  
Sur min, . . . sed elreviĝo tuj revenas . . .  
Kaj mi bedaŭre krias por resonĝi.

STEFANO.

Tio fariĝos noblega reĝlando por mi, en kiu mi havos muzikon senpage.

KALIBANO.

Kiam Prospero estos nuligita.

STEFANO.

Tio estos post ne longe; mi memoras vian diron.

TRINKULO.

Nun la sono foriĝas: ni sekvu ĝin, kaj poste la aferon ni faru.

STEFANO.

Konduku nin, monstro; ni sekvos.—Tiun ĉi tamburetiston mi tre dezirus vidi—Li laŭte ludas, ĉu ne?

TRINKULO.

Ĉu vi venas, Stefano? Mi tuj sekvos.

*(Ili foriras).*



### Sceno 3.—*En alia parto de l' insulo.*

(*Venas ALONZO, SEBASTIANO, ANTONIO, GONZALO, ADRIANO, FRANCISKO,  
kaj aliaj*).

GONZALO.

Per Dipatrin', ne povas mi plu marŝi,  
Doloras tro maljunaj miaj ostoj:  
Ne labirinto iam pli lacigis,  
Ol niaj iroj kaj deiroj. Reĝo,  
Per via pacienco, mi tuj restos.

ALONZO.

Sinjur' maljuna, mi ne vin kulpigas,  
Ĉar ankaŭ min atakas nun laciĝo,  
Kaj sensprigitige super mi pezegas . . .  
Sidiĝu, restu. Tie ĉi mi devas  
Forlasi la esperon tiel flatan  
Revidi filon mian. Ne, li dronis . . .  
Kaj vane ni vagadis por lin trovi,  
Dum maro mokas nian teriradon.  
Ho ve! li mortis.

ANTONIO (*flanken, al SEBASTIANO*).

Mi tre ĝojas  
Ke li plu ne esperas. Ne forlasu,  
Pro malprospero, tiun entreprenon,  
Pri kiu ni interligiĝis.

SEBASTIANO (*flanken, al ANTONIO*).

Bone:

Okazon proksimegan ni ekprenos.

ANTONIO (*flanken, al SEBASTIANO*).

Hodiaŭ ni, vespere, tion faros;  
Ĉar ili tiam estos lacigitaj

Per siaj marŝoj tie ĉi kaj tie,  
Kaj ili ne singardaj povos esti,  
Dormante tiel . . .

SEBASTIANO (*flanken, al ANTONIO*).

Bone, . . . jes, . . . vespere.

(*Solena kaj stranga muziko aŭdata*).

ALONZO.

Ho, kia belsoneco! kareguloj, aŭdu!

(*Venas PROSPERO, nevidebla, supre—Venas multaj strangeĝaj formoj  
kiuj alportas nutraĵon kaj festenilaron: ili dancas ĉirkaŭe kun ĝentilaj  
salutoj, invitas la Reĝon k.t.p. por manĝi, kaj tiam ili foriras*).

GONZALO.

Mirinde dolĉa sonas la muziko!

ALONZO.

Ĉielo gardaĝelojn al ni donu!  
Strangeĝaj tiaj formoj kiaj estas?

SEBASTIANO.

Ridinda estas viva petolaĵo:  
Nun kredos mi pri la unukornuloj,  
Ke Arabujo naskas tronan arbon,  
Sidejon de l' Fenikso; ke la birdo  
Nun reĝas tie.

ANTONIO.

Certe, mi mem kredos  
Eĉ ion ajn,—se vi ne kredos ĉion—  
Al mi do diru kion vi bonvolos,  
Mi ĵuros ĝin kredinda—Ĉar neniam  
Vojaĝemul' mensogis—kvankam, dome,  
Idiotuloj ridas.

GONZALO.

Se mi dirus  
En Neapolo ke ĉi tie loĝas  
Kreitoj tiel formaj kiel tiuj,—  
(Ĉar certe ili estas insulanoj)—  
Kaj, kvankam monstroformaj, ilin notu:  
Ilia ĝentileco eĉ superas  
La nian, kaj aliajn.

PROSPERO (*flanken*).

Honestulo,  
La veron diris vi: pli ol diabloj  
Malbonaj kelkaj inter vi nun estas.

ALONZO.

Je tio mi ne povas tro miregi:  
Esprimas formoj, gestoj, sonoj ĉion  
(Parolon kvankam ili ne posedas)  
Bonege, kion ili volas.

PROSPERO (*flanken*).

Laŭdo,  
La malaperon sekvas.

(*La strangaj formoj malaperas*).

FRANCISKO.

Stranga sveno!

SEBASTIANO.

Ne grave estas: ili nutron lasis,  
Kaj ni malsatas. Kiu volas manĝi?

ALONZO.

Neniam mi.

GONZALO.

Ne timu, nobla Reĝo.  
Ĉu en knabtempo kredis ni, ke homoj  
Ekzistas bovlaringon posedantaj  
Kun viandpoŝ' pendanta, aŭ aliaj  
Kun kapo en la brusto? Nun, ni vidas,  
Ke ĉiu revenanta rakontisto  
Al ni la pruvon donos. Do, ne timu.

ALONZO.

Nu! staros mi por manĝi, spite ĉio:  
Se por la lasta fojo, ne signifas . . .  
Ĉar mi jam la plej bonan tempon perdis . . .  
Vi, frato, kaj vi, Duko, nin imitu.

*(Fulmotondro. Venas ARIELO harpiforma, malfaldas flugilojn kaj per ili kovras la tablon: la festeno malaperas).*

ARIELO.

Vi, tri pekuloj estas, kiujn sorto  
(La granda reĝo de l' subluna mondo)  
Igis la maron, ĉiam malsategan,  
Vin vomis sur ĉi tiun landinsulon;  
Vin, inter homoj, plej malindajn vivi!  
Vi frezeziĝas kaj blindiĝas kiel  
Mempendigontoj aŭ memdronigontoj.

*(ALONZO, SEBASTIANO, kaj ANTONIO eltiras siajn glavojn).*

Ho, malsprituloj, mi kaj kunsekvantoj  
Ministroj sortaj estas: elementoj,  
El kiuj glavojn viajn homo faris,  
Pli taŭge laŭtan venton povus vundi,  
Mortigi la marakvon per ponardo,  
Ol eĉ flugilplumeron—mian blovi!  
Kaj estas el ni ĉiu nevundebla.  
Eĉ se vi vundi povus, tiuj glavoj  
Tro pezaj estas nun por brakoj viaj,  
Kaj ne leviĝi volas. Sed memoru—

(Ĉar tio estas mia nunafero)—  
Ke vi PROSPERON el Milan' forpelis,  
En maro lin lasante, kun filino.  
Nun, al vi tri, la maro venĝis ilin.  
Se vian hontindaĵon la Povegoj  
Prokrastis puni, ne forgesis ili:  
Marondojn, teron ili kolerigis,  
Ke ĉiu kreitaĵ' vin kontraŭstaru.  
Alonzo, vi, pro tio filon perdis, . . .  
Kaj mi malbonon al vi tri anoncas  
Ol morta kondamnego pli teruran;  
Ĉar paŝo ĝi post paŝo vin renkontos  
Sur tiu ĉi dezerta terinsulo:  
De l' venĝo vin nenio povas ŝirmi,  
Krom via korĉagreno pro la krimo,  
Kaj, de nun, vivo pura.

*(Malaperas en fulmotondron; tiam kun dolĉa muziko aŭdata, denove  
venas spiritaj formoj, kiuj, make grimacantaj, dancas ĉirkaŭe kaj  
forportas la tablon).*

PROSPERO (*flanken*).

Ho, mia Arielo, vi bravege  
Plenumis vian rolon de harpio,  
El l' instrukci' forgesis vi nenion;  
Eĉ vivaj ŝajnis gnomoj kaj koboldoj,  
Fantomoj, kiuj servas min fidele!  
Nun, kunligitaj, tiuj malamikoj  
Senspritaĵoj staras en la povo mia.  
Mi iros tuj—lasante ilin tiel—  
La bravan princon Ferdinandon vidi  
Kaj ankaŭ de ni du la karulinon. (*Foriras supren*).

GONZALO.

En nom' de io sankta, Reĝo mia,  
Vi kial staras tiel mirigita?

ALONZO.

Ho, monstra! monstra estas la apero!  
Parolis al mi la teruraj ondoj!  
Pri tio la blovado eĉ kantadis . . .  
Al mi la tondro, de l' ĉiel' orgeno,  
La nomon de PROSPERO elparolis,  
Min surdigante per profunda baso,  
Kaj kantotem' nur mia krimo estis!  
En mara ŝlimo, tial, filo kuŝas,  
Kaj pli profunde ol sondilo iam  
Fundiros mi kun li. (*Foriras*).

SEBASTIANO.

De malamikoj  
Malkune mi legiojn batalados!

ANTONIO.

Vin helpi mi tuj iros!

(*Foriras* SEBASTIANO kaj ANTONIO).

GONZALO.

Frenezuloj!  
Ilia kulp', veneno malrapida,  
Post longe mordas kaj turmentas ilin.  
Vi, kiuj povas kuri, mi petegas,  
Junuloj, sekvu ilin kaj malhelpu  
Malbonon ian kiun eble farus,  
Triope, koleruloj.

ADRIANO.

Kun mi venu! (*Ĉiuj foriras*).

## Akto IV.

### Sceno 1.—*Antaŭ la ĉambreto de PROSPERO.*

(*Venas PROSPERO, FERDINANDO, kaj MIRANDO.*)

PROSPERO.

Se tro severe mi kun vi agadis,  
Kompenso tuja vin ĝojigos plene,  
Ĉar de memvivo mi al vi fadenon  
Oferas: ŝi, por kiu mi nur vivas,  
Fariĝu via! . . . Sole de patramo  
Devenis la punŝajna humilego  
Per kiu vi suferis; l' amon vian  
Traprovi mi deziris, kaj, Reĝido,  
Vi noble, eĉ fortege submetiĝis  
Al laborego. Antaŭ la Ĉielo,  
Tre riĉan donon al vi mi certigas,  
Ho, Ferdinando! Tial, ne ridetu  
Se mi, fieraj filin' karega,  
Prilaŭdas ŝin, ĉar donas mi trezoron,  
Donante idon indan je feliĉo  
Pli ol mi povus diri.

FERDINANDO.

Vin mi dankas  
Kaj fidas pli ol ian orakolon!

PROSPERO.

Donacon mian, vian feliĉecon  
Gajnitajn brave, de mi nun ricevu:  
Mirando'n prenu; sed virgecon ŝian  
Ol vian vivon pli respektu, Princo,  
Ĝis de l' edziĝo l' unueco sankta

El vi du faros unu; ĉar, alie,  
Malbono anstataŭus dolĉan pacon  
Kaj superegan benon: via lito  
Ne konus amon, sed malpacon akran,  
Sovaĝan frukton de malpura vivo.  
Atendu ĉaste ĝis himenaj lampoj  
Vin al l' altar' kondukos.

FERDINANDO.

Ĉar mi preĝas

Por edza feliĉec', idaro nobla,  
Kaj paca, longa vivo, puran amon  
Mi tiel en mi sentas, ke nenio,  
Eĉ penso nemalkulpa loĝi povus  
En brusto plena je edzin' anĝela  
Karega tiel! La mallum' ereba  
Ne povon por min malvirtigi havus  
Kun ŝi apuda. Forte do mi staras:  
Nek tento, nek okazo min submetos  
Ĝis venos kroni la feliĉon nian  
Himena festo.

PROSPERO.

Bone vi ĵus diris.

Sidiĝu kune, ŝi nun estas via.  
(*Vokas*) Ho! Arielo, agemulo, venu!

(*Venas* ARIELO).

ARIELO.

Povestro mia, kion vi deziras?

PROSPERO.

Vi kaj sekvantoj agis ĵus bonege,  
Kaj mi bezonas, por alia servo,  
La helpon vian. Iru, alkonduku  
Ĉi tien viajn ĉiujn subspiritojn,



(Mi super ili al vi donis povon),  
Vigligu ilin, per rapida movo,  
Ĉar al ĉi tiuj junaj gefianĉoj  
Mi volas fantazion nun prezenti;  
Kaj ili ĝin atendas.

ARIELO.

Baldaŭ, mastro?

PROSPERO.

Tuj, nun, en palpebruma daŭro.

ARIELO.

Bone!

Antaŭ ol vi *venu!* diros,  
Aŭ dufoje *iru!* spiros,  
Obeante vin, ni iros,  
Piedfingre eĉ deiros,  
Supreniros, aŭ subiros,  
Laŭ ke vi mem ekdeziros. . . .  
Ĉu vian amon, mastro, mi akiros?

PROSPERO.

Spirito kara, certe, aerido!  
Ne venu nun, ĝis mi alvokos. . . .

ARIELO.

Bone! (*Foriras*).

PROSPERO (*al FERDINANDO*).

Ho, Princo, zorgu ĉiam esti vera:  
Ne ludu kun la ĉarma via ravo,  
Aŭ sanktaj ĵuroj pajlo nur fariĝus  
Por bruli en la brusto. Vin detenu,  
Aŭ al promesoj diru tuj adiaŭ.

FERDINANDO.

Sinjur', ne timu, ĉar la virga neĝo  
Jam koron mian tuŝis, kaj malhejtas  
La flamon ĉe l' hepato.<sup>[14]</sup>

PROSPERO.

Prave, bone!

(*Alvokas*) Nun, venu, Arielo, spiritaron  
Ĉi tien alkonduku! Estu viglaj!  
Nenian vorton! Nur okulojn! Vidu!

(*Dolĉa muziko aŭdata; venas IRISO*).

IRISO.

Cereso, venu, ho, belegulino!  
Foriru el kamparo kiun kovras  
Tritik', sekal', horde', aveno, pizoj,—  
El montoj, kie paŝtas sin la ŝafoj,  
El la herbejo, kiu donas fojnon,  
Brutaran nutron,—Bordoj ornamataj  
Per peonioj, verda kunplektaĵo,  
Sur kiuj ŝprucis la Aprila spongo,  
Por fari ĉastajn kronojn al la nimfoj;—  
El stiparbaro kies ombron serĉas  
De amantino fraŭlo forpelita;—  
El riĉa vinberejo, el marbordo  
Malfrukta, ŝtona, kie vi vagadas. . . .  
Ĉar, per Iriso, reĝa senditino,  
Ĉiela Juno vin alvokas: venu! . . .  
Kortegaj pavoj flugas tra l' aero. . . .  
Ĉi tien venu premi la herbejon;  
Gracie, baldaŭ la estrin' mem venos. . . .  
Alproksimiĝu! festu la Reĝinon!

(*Venas CERESO*).

CERESO.

Iris', saluton, multe-kolorita

De Juno fidelega heroldino!  
Flugilo flava via sur la floroj  
Dissemas mielgute dolĉan pluvon;  
Per ambaŭ finoj de l' arkaĵo blua  
Ĉirkaŭprenante arbajn ebenaĵojn,  
Kaj ankaŭ krutan senarbetan randon.  
De tero mia skarpo brila, diru,  
Tuj diru kial la Reĝino via  
Venigis min sur tiun ĉi herbejon?

IRISO.

De amo vera por kontrakton festi,  
Kaj ankaŭ por donacojn fari kelkajn  
Al karaj geamantoj.

CERESO.

Ĉielarko,  
Ĉu sekvas nun Venero kaj Cupido  
Reĝinon nian? Diru. De la tempo  
En kiu ili kune konspiradis  
Por min senigi je filin' amata,  
Veneron kaj Cupidon mi evitas.

IRISO.

Ne timu ŝin renkonti: mi ĵus vidis  
Trenatan per kolomboj, tra la nuboj,  
La veturilon kie ŝi, kun knabo,  
Rapidas nun al Pafos. Vane ili  
Ekpensis tie ĉi malbonon fari  
Al niaj geedzontoj, kiuj volas  
Atendi ĉaste la himenan torĉon:  
Marsamistinon venkis gevirtuloj;  
Eĉ ŝia vespa filo sagojn rompis,  
Kaj ĵuris ke de nun li plu ne pafos,  
Sed, simpla knabo, ludos kun paseroj.

CERESO.

Reĝin' altega, pova Juno venas:  
Ŝin konas mi per l' iro majestega!

(*Venas JUNO*).

JUNO.

Fratino malavara, kun mi iru  
Por beni tiujn ĉi du noblajn korojn;  
Ke ili ambaŭ estu prosperegaj,  
Feliĉaj per edzeco kaj idaro!

JUNO.

(*Kanto*).

*Honor', riĉec', edziĝbeno,  
Longa daŭro, idarpleno,  
Horoj ĝojaj per alveno  
Benu vin, de Juno l' beno!*

CERESO.

*Terplenego, sufiĉego  
En garbejo kaj grenejo,  
Frukto plena vinberejo,  
Arba, planta rikoltego,  
Kun printempa ĝoja daŭro,  
Benu vin ĝis lasta horo!  
De Ceres' la beno estu:  
Ĉe vi ke ne manko restu!*

FERDINANDO.

Ĉi tio estas vido majestega  
Kaj ĉarme rava! Ĉu mi nun eraras  
Pensante ke spiritoj estas ĉiuj?

PROSPERO.

Spiritoj, vere, kiujn povo mia  
El propraj regnolimoj ĵus alvokis

Por fantazion al vi doni.

FERDINANDO.

Ĉiam

Kun vi, miriga patro, kaj Mirando,  
Mi vivu en ĉi tiu Paradizo!

*(JUNO kaj CERESO mallaŭte kunparoladas kaj sendas IRISON for).*

PROSPERO.

Karulo, nun, silentu: la diinoj  
Kunparoladas grave, do, atentu,  
Muteme vidu, aŭ la ĉarmo svenos.

*(IRISO revenas).*

IRISO.

Najadoj, nimfoj de river' vagista,  
Kun junkaj kronoj kaj mieno ĉasta,  
Forlasu akvan la kuŝujon vian;  
Alkuru sur ĉi tiun verdan lokon.  
Obeu Junon, kiu vin alvokas;  
Rapidu, dolĉaj nimfoj, kaj nin helpu  
L' unuon de du koroj por ĝojigi.

*(Venas akvonimfoj).*

Vi, rikoltistoj lacaj per somero,  
Ĉi tien venu, el la garba kampo,  
Kun pajlĉapelo ĉiu kapvestita,  
Por gaje danci nimfan manon prenu,  
Kaj kune saltu en vilaĝa rondo.

*(Venas Rikoltistoj konforme vestitaj; ili alligiĝas kun la nimfoj en ĉarma danco, ĉe l' fino de kiu PROSPERO ektramas subite kaj severe parolas, kiam ĉiuj, meze de stranga, mallaŭta kaj malorda bruoj, peze malaperas).*

PROSPERO (*flanken*).

Ha! mi forgesis pri l' konspir' infera  
De besta Kaliban' kaj kunkrimuloj  
Por min mortigi: preskaŭ la minuto  
Tuj venos. (*Laŭte al la spiritoj*) Bone! Ĉiuj nun disiĝu!

FERDINANDO.

Pasie kiel via patro agas!

MIRANDO.

Neniam antaŭ tiel li koleris.

PROSPERO.

Vi, filo, ŝajnas al mi konsternita:  
Nu, estu gaja. Nia magiludo  
Nun ĉesas. La spiritoj ĝin farintaj  
Aer' maldensa tute refariĝis . . .  
Kaj, kiel tia malfortika revo,  
Eĉ turoj nubkronataj, eĉ palacoj,  
Solenaj la sanktejoj, ja, terglobo  
Kaj ĝia tutenhavo malaperos . . .  
Simile al ludsceno nesubstanca,  
Ne lasos ili strekon.—Nur songaĵoj  
Ni estas, kaj mallongan vivon nian  
Ĉirkaŭas dormo.—Princo, nun, mi sentas  
Interne ĉagreniĝon: min pardonu;  
Kompaton pro la mia maljuneco  
Mi petas, ĝis klariĝos mia cerbo.—  
Pri la okazo ne maltrankviliĝu:  
Se plaĉos al vi, iru en ĉambreton.  
Ripozu tie. Paŝoj kelkaj donos  
Al mi sentecon.

FERDINANDO kaj MIRANDO.

Paco kun vi estu! (*Ili foriras*).

PROSPERO.

Kun penso venu, Arielo, dankon! (*Venas ARIELO*).

ARIELO.

De penskunul' vi mastro, kion volas?

PROSPERO.

Spirit', kontraŭbatali Kalibanon  
Ni devas tuj. Preparu!

ARIELO.

Mastro mia,  
Cereson kiam ĵus mi personigis,  
Tre volis mi al vi pri tio diri,  
Sed tim' je vin ofendi min haltigis.

PROSPERO.

Rediru kie vi kanajlojn lasis.

ARIELO.

Jam, kiel mi ekdiris, la drinkuloj  
Kuraĝe bataladis kun l' aero,  
Ĉar ĝi sur ilin kompreneble blovas,  
Kaj, ĉar la tero kisas la piedojn,  
Severe ili frapis ĝin—Neniam  
Forgesis ili tamen la konspiron—  
Mi tiam tambureton ludis, kiam  
Ŝajnante ĉevalidoj neselitaj,  
Orelojn ili streĉis, palpebrumis,  
Flarantajn al muziko levis nazojn.  
Mi ĉarmis ilin tiel, ke, bovide,  
Forsekvis ili blekimiton mian  
Tra dornstiparoj, kaj kreskaĵoj pikaj,  
Tibiojn kiuj ŝire difektegis:  
Kaj, mastro, fine, ilin mi forlasis  
En marĉa, ŝlimpleniĝa starakvejo—  
Ĝis la menton' trempiĝas la drinkuloj  
Malpuraj—

PROSPERO.

Brave, bone, mia birdo!  
En groton mian iru nevidebla,  
Alportu brilajn senvalorajn vestojn  
Kaj falsan juvelaron por, ĉi tie,  
Ŝtelistojn ruze kapti.

ARIELO.

Tuj mi iras. (*Foriras*).

PROSPERO (*Sola*).

Diablo li naskiĝis, laŭ deveno,  
Instruo monstron ne refari povas.  
Humane volis mi lin ekbonigi,  
Sed vane, ĉar kreskigas lin la jaroj,  
En korpo kaj animo, pli malbelan.—  
Mi tiel punos tiujn tri kanajlojn  
Ke ili blekos!

(*Ekvidante ARIELON, kiu revenas portante brilŝajnan vestaĵon, k.t.p.*).

Ĉio ŝnure pendu!

(*PROSPERO kaj ARIELO restas nevideblaj*).

(*Venas KALIBANO, STEFANO, kaj TRINKULO, tute malsekaj*).

KALIBANO.

Mi petas, dolĉe paŝu, ke ne aŭdu  
Eĉ blinda talpo, ĉar ni proksimiĝas  
Al lia grotĉambreto.

STEFANO.

Monstro, via feino, laŭ via diro, kiu estas tiel senkulpa, verŝajne agis  
fripone kun ni.

TRINKULO.

Monstro, mi tute flaras malpuraĵon, kaj mia nazo tre indignas je tio.

STEFANO.



Mia simile sentas sin. Ĉu vi aŭdas, monstro? Se okazos ke vi min malkontentigos, gardu vin, ĉar. . . .

TRINKULO.

Vi tiam estos pereinta monstro.

KALIBANO.

Sinjur', daŭrigu vidi min favore;  
Trankvila restu, ĉar premio via  
La malfeliĉon mokos. Do, mallaŭte  
Parolu. Ĉio, tie ĉi, silentas  
Al noktomez' simile.

TRINKULO.

En ŝlimejo  
Botelojn niajn perdis ni hontege.

STEFANO.

Tio estas ne nur malhonora kaj malbonfama, sed ankaŭ senlima perdo.

TRINKULO.

Estas por mi pli grave ol la malsekaĵo. Pro ĝi, tamen, monstro, ni devas danki vian naivan feinon!

STEFANO.

Tuj mi iros serĉi mian botelon, eĉ se tio kostos al mi superorelan subŝmiriĝon.

KALIBANO.

Mi petas, Reĝo mia, kvietiĝu.  
Ĉu vi ne vidas tie l' enirejon  
Al la grotĉambro! Nun, silente iru  
Por tiun bonan malbonaĵon fari,  
Per kiu via estos la insulo,  
Kaj Kaliban' al vi piedlekanto.

STEFANO.

Donu al mi la manon. Mi eksentas en mi sangavidajn pensojn.

TRINKULO.

Ho, Reĝo Stefano! Nobelo, inda Stefano! Rigardu, kia vestejo tie estas por vi!

KALIBANO.

Ne tuŝu la ĉifonojn, malsaĝulo!

TRINKULO.

Ho, ho! monstro, ni bone konas tion, el kiu konsistas ĉifonejo. Ho, Reĝo Stefano!

STEFANO.

Trinkulo, tiun robon tuj demetu:  
Per mia mano, nur mi ĝin posedos.

TRINKULO.

Ĝin havos l' insulestra Via Moŝto.

KALIBANO.

Azen', ke akvoŝvelo vin dronigu  
Mirantan je l' falsaĵo! Kun mi venu.  
Tuj ni mortigu lin. Se li vekigōs,  
De piedfingro ĝis krani' je pinĉoj  
Li turmentege kovros niajn haŭtojn,  
Kaj igos nin hundbleki.

STEFANO.

Ho, silentu,  
Silentu, monstro. Ĉu la ŝnurlinio  
Ĉi tiun jakon por mi ne intencas?  
Ĝin tuj mi prenos, ĉar ĝi certe taŭgas.

TRINKULO.

Pravege, ŝnurlinie, nivelile!

STEFANO.

Dankon al vi pro tia ŝerco: jen estas vesto pro ĝi: spriteco ne estos senpremia dum mi staros reĝo de tiu ĉi lando. Ŝnurlinie, nivelile ŝteli, estas bonega spritludo; jen estas alia vesto pro ĝi.

TRINKULO.

Venu, monstro, metu iom da gluo sur viajn fingrojn kaj forportu la ceterajn.

KALIBANO.

Ne tuŝos ilin mi; ni tempon perdos;  
Li bernikligos aŭ nin simiigos  
Kun fruntoj bestaj, tre malsupreniĝaj.

STEFANO.

Monstro, uzu viajn fingrojn: helpu nin por ke ni tion forportu tien, kie kuŝas mia barelo da vino, aŭ alie mi tuj forpelos vin el mia reĝlando. Vigle! portu tion ĉi.

TRINKULO.

Kaj ĉi tion.

STEFANO.

Jes, kaj tion ĉi.

*(Ĉasa bruego aŭdata. Alvenas diversaj hundformaj Spiritoj kiuj dispelas ilin ĉirkaŭe, incitataj de PROSPERO kaj ARIELO).*

PROSPERO (*laŭte*).

He! Monto, he!

ARIELO (*laŭte*).

Arĝento! tien ĝi kuras, Arĝento!

PROSPERO.

Furio, Furio! tien! Tirano, tien! aŭdu, aŭdu!

*(KALIBANO, STEFANO, kaj TRINKULO estas forpelitaj).*

Al miaj koboldetoj tuj ordonu  
Ke de l' ŝtelistoj pinĉu ili haŭton,  
L' artikoj kaj la muskolaron premu  
Per teruregaj streĉoj; ke makuloj  
Tramarku ilin kiel leopardojn,  
Aŭ eĉ sovaĝajn katojn.

ARIELO.

Aŭdu blekojn!

PROSPERO.

Malŝpare ilin for de ĉie pelu.  
En la nunhoro malamikoj miaj  
Sin sentas tute sub la mia povo:  
Finiĝos por mi laboregoj baldaŭ;  
Spirito, vi tuj havos liberecon—  
Dum nur mallonge sekvu kaj min servu.

*(Foriras).*

## Akto V.

### Sceno 1.—*Antaŭ la grotĉambro de PROSPERO.*

(*Venas PROSPERO magie vestita, kaj ARIELO.*)

PROSPERO.

Nun mia plano venas al finiĝo.  
Spiritoj magipove min obeis  
Oportunege. Horo nun kioma?

ARIELO.

La sesa proksimiĝas. Vi promesis  
Ke tiam ĉesos nia laborado.

PROSPERO.

Promeson mian certe mi plenumos,  
Ĉar bone vi min servis. Diru kien  
La Reĝon kaj sekvantojn vi kondukis.

ARIELO.

Sub l' ombrodona via tiliaro,  
Malliberuloj, kune ili staras  
Terure timigitaj; en la stato  
Por ilin puni de vi preparita,  
Ne povas ili ŝanĝi ĝis vi volos.  
La Reĝo, lia frato, kaj la via  
Triope staras strange konsternitaj,  
Dum la ceteraj ploras apud ili,—  
Precipe l' bona maljunul' Gonzalo,  
Sur kies blankan barbon larmoj falas  
Simile al malvarmaj vintraĵ gutoj  
De kana tegmentrando. Via povo  
Ĉagrenas ilin nun interne tiel

Ke ilin vidi tuŝus vian koron.

PROSPERO.

Ĉu vi, spirito, tion vere pensas?

ARIELO.

Min tuŝus tio se mi estus homa.

PROSPERO.

Min tuŝu ĝi do, ĉar mi homo estas.  
Ĉu vi, aero nur, kompatas homojn,  
Dum, similul' ilia, mi ne sentos  
Pli ol vi kompatema?—Kiel ili  
Ĉu ĝojon, ĉu ĉagrenon mi ne havas?  
Malbone kvankam ili kun mi agis,  
Kaj vundis min profunde, mi forpelos  
Koleron mian propran: grandanimo  
Ol venĝo estas virto pli laŭdinda.  
Pentantajn ilin povas mi pardoni,  
Eĉ sen sulkiĝo. Iru, Arielo,  
Kaj ilin liberigu. Magiaĵon  
Tuj rompos mi, al ĉiu por redoni  
Sentemon ĝustan.

ARIELO.

Tuj mi iros, Mastro. (*Foriras*).

PROSPERO.

Koboldoj riveretaj kaj montetaj,  
Lagamistetoj, arbarvizitistoj;  
Vi, sur la sablo kiuj l' ondon sekvas,  
Kaj ride antaŭkuras for l' alfluan;  
Duonestajoj, kiuj sub la luno,  
Elfaras la maldolĉajn herbrondaĵojn  
Maĉeblajn tute ne de la ŝafino;  
Vi, fungfaristoj, kiuj nokte ludas,  
Kaj ĝoje aŭdas vespersonoradon—

Per vi, malfortaj kvankam estaĵetoj,  
Tagmezan povis mi nubigi sunon,  
Eĉ leviĝigi ventojn ribelantajn,  
Eĉ verdan maron kun ĉielo blua  
Interbatigi muĝe; mi fulmigis  
Tra laŭtkrakanta tondro; fajre fendis  
La Jupiteran kverkon per difulmo.  
Mi skuis promontoran fundamenton,  
Elradikigis cedron kaj pinarbon;  
Eĉ tomboj vekis siajn endormantojn  
Kaj malfermiĝis ilin por forsendi,  
Per mira povo mia.—Sed nun ĉesu  
La magiarto, de mi forĵurita;  
Ĉar, poste iom da muziko dolĉa,  
(Tuj de mi dezirata por ke baldaŭ  
Pentuloj sentojn siajn ree havu)  
Korege rompos mi bastonon mian  
Kaj teren ĝin enfosos multajn futojn,  
Kaj, pli profunde eĉ ol ajn sondilon,  
La libron mi dronigos!

(Solena Muziko).

(*Revenas ARIELO; lin sekvas ALONZO kun freneza mieno, kune kun GONZALO; SEBASTIANO kaj ANTONIO, sammaniere, kune kun ADRIANO kaj FRANCISKO.—Ili ĉiuj enpaŝis la rondon, kiun PROSPERO estis antaŭpretiginta: tie ili staras magie senmovaj; tion vidante, PROSPERO parolas:*)

Ari' solena, taŭga kuracado,  
Nun senutilan vian tutan cerbon  
Rekonsciigu, en kranio via:  
Cetere vi en magipovo staras.—  
Gonzalo! virta, honorinda viro,  
Okuloj miaj simpatie ploras  
Kun viaj; falas de mi frataj larmoj . . .  
—Magio nun rapide malaperos,  
Kaj, kiel la maten' svenigas nokton,

Iliaj sentoj la nebulan staton  
Forigos tuj, kaj ree sin ekvekos.—  
Gonzalo! bona vir', savinto mia,  
Subul' al via Reĝo tre fidela,  
Noblanimulo, estos viaj servoj  
Pagitaj hejme, voĉe, kaj per agoj!  
Alonzo, tre kruele vi agadis  
Kun mi kaj kara infanino mia,  
Kaj tiu via frato krime helpis,—  
—Sebastian' interne tion sentas—  
Eĉ vi, ho frato! karno, sango mia,  
Mortigis, ambicie, natursentojn,  
Sebastianon puŝis al perfido . . .  
—Duoble li pro tio nun suferas!—  
La Reĝon ambaŭ vi mortigi volus . . .  
Sed al vi mi pardonas, Antonio.  
—Ilia komprenado ekrevenas:  
Idealfluo sane replenigos  
Pensrandon magiŝlime nun kovritan.  
El ili tamen min neniu konus,  
Eĉ se min ili vidus.—Arielo,  
Alportu mian glavon kaj ĉapelon.

*(Foriras ARIELO).*

Nun tute magiveston mi deprenu,  
Kaj kiel dukon de Milan' min montru.

*(Al ARIELO kiu revenas kaj helpas vesti lin).*

Spirit', rapidu! Vi tuj liberiĝos!

*ARIELO kantas:*

*Ĉe l' Abel' kunsuĉos mi,  
En primolo kuŝos ni,  
Tie ni ripozos, dum  
La strigo vokos en mallum'.  
Sur vesperto rajdos mi  
Post la somer', gaje, ho!*



*Gaje tre! gaje, ho! vivos mi nun,  
Sub arba flor' varmigata de l' sun'.  
Gaje, ho! vivos mi, gaje tre, nun,  
    Varmigos min la brila sun',  
Sub arba floro mi vivos nun!*

PROSPERO.

Ĉarmege! Al mi, Ariel', vi mankos;  
Sed vi libera estos aerido.  
Ĉi tien de la Reĝa ŝip' venigu  
Ŝipestron kaj subestron ĉiam viglajn,  
Maristojn ankaŭ sub ferdek' dormantajn.  
Tuj iru.

ARIELO.

Mastro, mi l' aeron glutos:  
Eĉ antaŭ du pulsbatoj mi revenos.

*(Foriras ARIELO).*

GONZALO.

Turmento, peno, miro kaj mirego  
Ĉi tie loĝas: ke ĉiela povo  
Konduku nin el la insul' terura!

PROSPERO.

La suferintan dukon de Milano,  
Prosperon, nun rigardu, moŝta Reĝo!  
Por pli ĉertigi ke vivanto princa  
Al vi parolas, mi vin ĉirkaŭprenas:  
Ĉar al vi kaj sekvantoj mi deziras  
Bonvenon, kore!

ALONZO.

Ĉu Prosper' vi estas,  
Aŭ sorĉapero por min malinformi,  
Ne povus nun mi diri: via pulso

Tre home batas certe: mi ekpensas  
Ke, de l' intervidiĝo nia lasta  
Ĝis nun, posedas min frenezo ia. . . .  
Ĉu ne postulas ĉio ĉi klarigon,  
Rakonton strangan?—La dukecon vian  
Forlasas mi, de vi nun peteganto!  
Pardonu mian kulpon!—Sed, Prospero!  
Ĉi tie kiel staras li—kaj vivas?

PROSPERO.

Unue, nobla maljunul' Gonzalo,  
Ke mi vin respektege ĉirkaŭprenu:  
Honoro via estas netaksebla,  
Eĉ senegala.

GONZALO.

Ĉu ĉi tio estas?  
Ĉu ne? Mi ne komprenas. . . .

PROSPERO.

Strangaĵecon  
Insulnaskitan, vi ankoraŭ sentas;  
Ĝi ne permesas al vi veron vidi.  
Bonvenon koran al amikoj miaj!—

*(Flanken al SEBASTIANO kaj ANTONIO).*

Se tamen volus mi, kortega paro,  
Malkaŝi perfidaĵon vian, vere  
Sur vin sulkiĝus tuj la Reĝa brovo;  
Sed mi silentos.

SEBASTIANO (*flanken*).

Li diable prava!

PROSPERO (*al ANTONIO*).

Vi, malbonulo, kiun frato' nomi  
Eĉ buŝon malpurigus, mi pardonas

Kulpegojn viajn tute, postulante  
Ke al mi tuj duklandon vi redonu—  
Sed tion nepre vi devige faros—

ALONZO.

Se estas vi Prosper', al ni rakontu  
Detale vian ĝis nun konserviĝon;  
Klarigu tiun ĉi interrenkonton—  
Ĉar de tri horoj nur, ni marirante  
Suferis ŝippereon sur ŝtonbordo,  
Kaj tie mi (kruela penso!) perdis  
Karegan filon!

PROSPERO.

Tre mi vin kompatas!

ALONZO.

Neriparebla perdo! Pacienco  
Kuraci ĝin ne povas.

PROSPERO.

Sed mi pensas  
Ke vi ne tute petas ĝian helpon:  
Al mi, por sama perdo, pacienco  
Fariĝas kontenteco konsolanta.

ALONZO.

Ĉu vi ĵus dirus, "sama perdo"?

PROSPERO.

Sama,

Kaj ankaŭ tute nova. Elportebla  
Por fari ĝin mi havas nur rimedojn  
Ol viaj pli malfortajn, ĉar filinon  
Ne antaŭ longe perdis mi.

ALONZO.

Filidon?

Ĉielo! kial, Reĝo kaj Reĝino,  
En Neapolo nun ne estas ili?  
Por okazigi tion, tre volonte,  
Anstataŭ filo mia, sur marfundo  
Mi kore enŝlimiĝus. Nu, filidon,  
Ŝin kiam perdis vi?

PROSPERO.

En la Ventego,  
Samtempe kiam vi la filon perdis.  
Mi vidas ke tre miras vi, sinjoroj,  
Pri tiu ĉi okaz'; vi preskaŭ dubas  
L' ateston de okuloj kaj oreloj;  
Sed, kiel ajn vi provizore perdis  
De l' sentoj uzon, sciu nun ke certe  
Prosper' mi estas, mi la rajta duko,  
Mi, kiu, forpelita el Milano  
Atingis poste la insulon kies  
Ĉefviro estas mi, sur kies bordo  
Okazis via propra ŝippereo.  
Sed tian ĉiutagan historion  
Nek povus mi rakonti en kunsido,  
Nek dum tagmanĝo. Nu! bonvenon, Reĝo,  
Al la grotĉambro nur kortego mia.  
Interne sekvantar' nenia staras,  
Ekstere ne subuloj: nun, rigardu!  
Tuj, pro duklando kiun vi redonas,  
Mi pagos vin per multa plibonaĵo:  
Almenaŭ kontentigos vin la vido  
Eĉ pli ol min duklando.

*(La grotĉambro malfermiĝas kaj montras FERDINANDON kaj MIRANDON  
ŝakludantajn).*

MIRANDO.

Vi friponas,

Karulo—

FERDINANDO.

Ne, amata koro mia,  
Por tuta mond' ne volus mi falsludi.

MIRANDO.

Falsludi povus vi, por dudek regnoj,  
Eĉ tiam dirus mi ke vi bonludas.

ALONZO.

Se estas tio nur insulapero  
Karegan filon mi dufoje perdos.

SEBASTIANO.

Mirakl' altega!

FERDINANDO.

Kvankam muĝas l' ondoj,  
Kompaton havis ili: mi neprave  
Malbenis ilin.

*(Genufleksas al ALONZO).*

ALONZO.

Ke plenkoraj benoj  
De ĝoja patro vin ĉirkaŭu tute:  
Leviĝu. Kiel vi ĉi tien venis?

MIRANDO.

Ho! miro! kiom da kreitoj belaj  
Nun staras tie ĉi! homaro nobla!  
Belega, nova!

PROSPERO.

Nova por vi, kara.

ALONZO (*al* FERDINANDO).

Ŝin, kiu kun vi ĵus interŝakludis,  
Al mi konigu—kvankam reciproke  
Nur estas vi trihoraj gekonatoj—  
Ĉu estas ŝi diin' nin disiginta  
Por nin reunuigi?

FERDINANDO.

Ne, sinjoro;  
Mortema ŝi; sed, per nemorta Povo,  
Ŝi mia estas, de mi elektita  
En tempo, kiam nek de vi permeson  
Mi peti povis, nek vin pensis viva;  
Filino de Milana fama duko—  
—Tre ofte jam lin aŭdis mi laŭdatan,  
De mi, ĝis nun, lin tamen nekonatan—  
De kiu novan vivon mi ricevis:  
Per kara fianĉino li fariĝas  
Nun dua patro mia.

ALONZO.

Patro ŝia  
Fariĝas mi.—Sed kiel strange ŝajnas  
Pardonon peti de l' infano mia!

PROSPERO.

Sinjoro, haltu tie: ni ne ŝarĝu  
Memoron nian per la malbonaĵo  
Feliĉe nun pasinta.

GONZALO.

Mi interne  
Ĵus tiel ĝoje ploris, ke pli frue  
Ne povis mi paroli . . . Dioj povaj!  
Rigardu, benu per duobla krono  
Geprincojn niajn! Ĉar vi markis vojon

Por la interrenkonto!

ALONZO.

Amen! Estu!

GONZALO.

Ĉu el Milan' Prospero forpeliĝis  
Por ke l' idaro lia reĝe sidu  
Sur Neapola trono? Estu ĝojaj!  
Plej ĝojaj kiel eble! Tion skribu  
En orleteroj sur kolonoj daŭraj.  
Vojaĝo mira! edzon en Tuniso  
Akiris Klaribel'; per ŝippereo  
Edzinon ŝia frato Ferdinando  
Feliĉe trovis; eĉ Prosper' duklandon,  
Kaj ĉiu el ni sin mem—jam perditan—  
En insulet' retrovas.

ALONZO (*al FERDINANDO kaj MIRANDO*).

Viajn manojn

Al mi nun donu: doloriĝu koro  
Ne deziranta al vi ĝojon.

GONZALO.

Amen!

(*Revenas ARIELO kun ŝipestro kaj subestro tute miregante sekvantaj  
lin*).

Sinjoro! nun rigardu, el ni vivas  
Pli multaj ol eĉ povus ni esperi!  
Ĉu en la ŝipo mi ne antaŭdiris  
Ke tia maltaŭgulo ne droniĝos  
Se estas pendigilo apud bordo?  
Marblasfemulo, tute vi silentas:  
Ĉu landnovaĵon vi ne povas ĵuri?

SUBESTRO.

Ke ni revidas Reĝon kaj sekvantojn,  
Novaĵo la plej bona certe estas:  
Nur tri sabloŭtiloj malpleniĝis  
De l' ŝipfendiĝo ĝis la nunminuto,  
Sed, tute ŝnurarmita, nia ŝipo  
Nun estas bele taŭga por mariri,  
Kaj tia kia ĝi antaŭe estis.

ARIELO (*flanken al* PROSPERO).

Sinjoro, mi plenumis tiun servon  
Dum forestado mia.

PROSPERO (*flanken al* ARIELO).

Mirestaĵo!

ALONZO.

Okazoj tiaj ne naturaj estas:  
Eĉ ili pli kaj pli strangiĝas. Diru,  
Ĉi tien kiel ambaŭ el vi venis?

SUBESTRO.

Sinjoro, se mi nun ne malspritiĝos  
Volonte al Vi mi sciigos tion . . .  
Ni ĉiuj morte sentis nin dormemaj,  
Kaj sub ferdek' kuŝantaj . . . Bruegaĵo  
Katena, bleka, muĝa, kaj kriega  
El tiu loko nin terure vekis . . .  
Liberaj tiam, ni mirege vidis  
La reĝan, bonan, bravan ŝipon nian,  
Ŝnuraĵigita kaj de nove taŭga.  
Ŝipestro nia vigle, gaje kuris  
Por ĝin rigardi—Sed, dum palpebrumo,  
Nubiĝaj, sonĝe, ĉiujn ni forlasis . . .  
Kaj tien ĉi veniĝis . . .

ARIELO (*flanken al* PROSPERO).

Ĉu mi bone



Elfaris vian volon?

PROSPERO (*flanken al* ARIELO).

Diligente!

Tuj estos vi libera!

ALONZO.

Labirinton

Similan viro ajn neniam paŝis;  
Gvidil' mirega, ol natur' pli alta,  
La tuton antaŭplanis. Orakolo  
Nur povus ĝin klarigi.

PROSPERO.

Reĝa Moŝto,

Plu ne turmentu nun spiriton vian  
Pri tiuj ĉi strangaĵoj . . . Libertempe.  
Ne longe de nun, poste mi klarigos  
Okazojn, kiujn eble vi aprobos:  
Ĝis tiam, estu ĝoja, mi petegas.  
(*Flanken al* ARIELO) Spirito, venu: tuj nun liberigu  
Eĉ Kalibanon kaj kunulojn liajn.

(*Foriras* ARIELO).

Mi petas vin, ho Reĝo, kontentiĝu.  
Ankoraŭ mankas kelke da sekvantoj,  
Sed ilin vi kredeble ne memoras.

(*Revenas* ARIELO *enpuŝanta* KALIBANON, STEFANON, kaj TRINKULON, *kiuj portas la ŝtelitan vestaĵon*).

STEFANO.

Ĉiu homo elturniĝu por la ceteraj, kaj neniu estu singardema, ĉar ĉio estas nur ŝanco. Kuraĝe! monstregulo! kuraĝe!

TRINKULO.

Se kredindaj estas la spioniloj kiujn mi portas vizaĝe, jen estas bela vidaĵo!

KALIBANO.

Setebos! estas jen spiritoj gloraj!  
Kaj kiel bela estas mia mastro!  
Mi timas ke li min severe punos.

SEBASTIANO.

Ha, ha! sinjoro mia, Antonio,  
Objektoj tiaj, diru, kiaj estas?  
Ĉu aĉeteblaj?

ANTONIO.

Ili? Kompreneble,  
Ĉar unu estas fiŝo, kaj vendebla.

PROSPERO.

La montron de la trio bone notu,  
Sinjoroj. Ĉu honestaj ili ŝajnas?  
De tiu malbelulo la patrino  
Potenca sorĉistino tiel estis,  
Ke ŝi la lunon povis eĉ kontroli,  
Alfluon kaj forfluon vole fari,  
Eĉ kontraŭ la lunpovo—Nun, triope,  
Vestaĵon tiun ili de mi ŝtelis—  
La duondiablido min mortigi,  
Per helpo de kunuloj, jam intencis;  
Du el maltaŭĝanaro vi mem konas:  
Ĉi tiu mallumaĵo estas mia.

KALIBANO.

Min morte pinĉos li!

ALONZO.

Kelisto mia,  
Ĉu li drinkema estas ne Stefano?

SEBASTIANO.

Ebria nun, li kie ŝtelis vinon?

ALONZO.

Trinkulo mem de vino ŝanceliĝas:  
El kie prenis ili la likvoron  
Maturiĝantan en la maltaŭguloj?  
Peklaĵon tian kio kaŭzis? Diru!

TRINKULO.

De l' tempo de mia lasta renkonto kun Vi, mi troviĝis en tia peklaĵo, ke  
kredeble ĝi neniam foriros el miaj ostoj: mi ne timos muŝovĝermiĝon!

SEBASTIANO.

Nu! kion vi diras, Stefano?

STEFANO.

Ne tuŝu min! Mi jam ne estas Stefano, sed nur streĉego!

PROSPERO.

Vi volus esti Reĝo de l' insulo?

STEFANO.

Doloran Reĝon havus do l' insulo.

ALONZO (*montrante* KALIBANON).

Strangaĵon tian mi ĝis nun ne vidis!

PROSPERO.

Malbonkondata estas li, Sinjoro,  
Eĉ tiel kiel estas li malbela—  
Vi tri, tuj iru en grotĉambron mian  
Kaj bele ĝin balau kaj ornamu,  
Pardonon mian se vi gajni volas.

KALIBANO.

Mi certe volas. En la estonteco

Pli saĝa tute estos mi, kaj penos  
Pardonon de la mastro por ricevi.  
Ho triobleduobla mi azeno!  
Por dio mi trinkulon tian prenis  
Kaj malspritulon mi adoris!

PROSPERO.

Iru!

ALONZO.

For de ĉi tie kaj pakaĵon portu  
Al ĝia loko—

SEBASTIANO.

Kie ĝin vi ŝtelis.

*(Foriras KALIBANO, STEFANO, kaj TRINKULO).*

PROSPERO.

Nun, Via Reĝa Moŝto, kaj sekvantoj,  
Bonvolu tuj akcepti la gastamon  
De simpla groto, kie vi ripozos  
Ĉi tiun noktodaŭron. Tre rapide  
La tempon ni pasigos: mi rakontos  
Al vi la mian vivon, de l' momento  
En kiu la insulon mi atingis.  
Matene morgaŭ vin mi kunkondukos  
En vian ŝipon, poste Neapolon,  
Ĉefurbon kie mi esperas vidi  
De niaj gekaruloj la edziĝon,  
Kaj fine, en Milano mia, vivos  
Min pretiĝante por la tombo.

ALONZO.

Vere,

Mi tre deziras aŭdi la rakonton  
De viaj aventuroj en l' insulo:

Tre stranga devus esti.

PROSPERO.

Vi ĝin aŭdos:

Mi ĉion diros; mi al vi promesas  
Kvietajn ondojn, tre facilajn ventojn,  
Eĉ tian marveturon ke vi trafos  
Ŝiparon vian kvankam malproksiman—  
(Al ARIELO) Vi, Arielo, tion tuj elfaros,  
Birdeto kara, tiam, liberiĝu!  
Adiaŭ, Ariel'!—(Al ALONZO kaj aliaj) Kun mi nun venu!

(Ĉiuj foriras).

## EPILOGO

parolata de Prospero

Nun magio plu ne estas:  
Sola mi malforta restas.  
Dum tri horoj, estas vere  
Ke vi agis ne severe  
Kun mi, duko de Milano  
Kiun timis Kalibano.  
Kiam ĉiujn mi pardonis,  
Al mi vi aprobon donis:  
Spite je la uzurpulo  
Me ne restos en l' insulo.  
Neapolon tuj nin sendu;  
Ne prokrastu, ne atendu.  
Kun remmanoj de aplaŭdo,  
Ankaŭ kun voĉventa laŭdo,  
Brave helpu nin elfari  
Nian celon sen erari.  
Se petanta mi eĉ pekos,  
Mi pardonon en vi vekos.

Preĝu por ni, ho popolo!  
Ke ĉi tie eĉ ne colo  
De malamo sin vidigu,  
Nin, gefratoj, liberigu.

1623-1903

Nubkronaj Turoj

Sesparta Kanto de R.J. Stevens

El “La Ventego”

Adagio ne troa.

music

Nub-kronaj turoj, kaj luksaj pa-lacoj solen-aj sankte-joj Eĉ la granda  
terglobo kaj ĝi-a tuten-havo

kaj luksaj pa-lac-oj solen-aj sanktejoj Eĉ la granda ter-globo kaj ĝi-a  
tuten-havo

Nub-kronaj turoj, kaj luksaj pa-lac-oj solen-aj sanktejoj Eĉ la granda  
terglobo kaj ĝi-a tuten-havo

mala-peros, si-mile al lud-sceno ne substanca, Ne lasos ili strekon, ian  
strekon lasos ne!

mala-peros, si-mile al lud-sceno ne substanca, ian strekon lasos ne!

mala-peros, si-mile al lud-sceno ne substanca, ian strekon lasos ne!



## PIEDNOTOJ

[1] *Angle*: prickly broom *or* furze-covered land.

[2] *Angle*: “chanticleer.”

[3] SEBASTIANO rimarkas ke li pagis la garantiaĵon, ĉar li ĵus ridis.

[4] Tiun ĉi vorton GONZALO diras por recertigi al ADRIANO ke Kartago estis Tuniso.

[5] Malnova monero, la okono da penco.

[6] *Amen*, por *sufiĉe*, en la STEFANA pentrinda ĵargono.

[7] Aludo al la proverbo: *Kiu manĝas kun la diablo, tiu bezonas longan kuleron.*

[8] *Kisu la libron* = *trinku el la botelo*, laŭ STEFANO.

[9] *Kisu la libron* = *trinku el la botelo*, laŭ STEFANO.

[10] *Kisu la libron* = *trinku el la botelo*, laŭ STEFANO.

[11] *t.e.*, Trinkulon.

[12] *t.e.*, Trinkulo.

[13] *t.e.*, Prospero.

[14] Antikvuloj kredis ke pasioj loĝas en hepato.

Esperantists and others wishing to secure a copy of LA VENTEGO (Illustrated Art Edition) should remit, without delay, 2s. 7d. (3 fr. 30 c.; 2 mark 70 pf.; 1¼ roubles; 65 cents) to THE ESPERANTIST, 40, Outer Temple, London, W.C., England.

\*\*\* END OF THE PROJECT GUTENBERG EBOOK LA VENTEGO DE SHAKESPEARE \*\*\*

Updated editions will replace the previous one—the old editions will be renamed.

Creating the works from print editions not protected by U.S. copyright law means that no one owns a United States copyright in these works, so the Foundation (and you!) can copy and distribute it in the United States without permission and without paying copyright royalties. Special rules, set forth in the General Terms of Use part of this license, apply to copying and distributing Project Gutenberg™ electronic works to protect the PROJECT GUTENBERG™ concept and trademark. Project Gutenberg is a registered trademark, and may not be used if you charge for an eBook, except by following the terms of the trademark license, including paying royalties for use of the Project Gutenberg trademark. If you do not charge anything for copies of this eBook, complying with the trademark license is very easy. You may use this eBook for nearly any purpose such as creation of derivative works, reports, performances and research. Project Gutenberg eBooks may be modified and printed and given away—you may do practically ANYTHING in the United States with eBooks not protected by U.S. copyright law. Redistribution is subject to the trademark license, especially commercial redistribution.

START: FULL LICENSE



# THE FULL PROJECT GUTENBERG LICENSE

PLEASE READ THIS BEFORE YOU DISTRIBUTE OR USE THIS WORK

To protect the Project Gutenberg™ mission of promoting the free distribution of electronic works, by using or distributing this work (or any other work associated in any way with the phrase “Project Gutenberg”), you agree to comply with all the terms of the Full Project Gutenberg™ License available with this file or online at [www.gutenberg.org/license](http://www.gutenberg.org/license).

Section 1. General Terms of Use and Redistributing Project Gutenberg™ electronic works

1.A. By reading or using any part of this Project Gutenberg™ electronic work, you indicate that you have read, understand, agree to and accept all the terms of this license and intellectual property (trademark/copyright) agreement. If you do not agree to abide by all the terms of this agreement, you must cease using and return or destroy all copies of Project Gutenberg™ electronic works in your possession. If you paid a fee for obtaining a copy of or access to a Project Gutenberg™ electronic work and you do not agree to be bound by the terms of this agreement, you may obtain a refund from the person or entity to whom you paid the fee as set forth in paragraph 1.E.8.

1.B. “Project Gutenberg” is a registered trademark. It may only be used on or associated in any way with an electronic work by people who agree to be bound by the terms of this agreement. There are a few things that you can do with most Project Gutenberg™ electronic works even without complying with the full terms of this agreement. See paragraph 1.C below. There are a lot of things you can do with Project Gutenberg™ electronic works if you follow the terms of this agreement and help preserve free future access to Project Gutenberg™ electronic works. See paragraph 1.E below.

1.C. The Project Gutenberg Literary Archive Foundation (“the Foundation” or PGLAF), owns a compilation copyright in the collection of Project Gutenberg™ electronic works. Nearly all the individual works in the collection are in the public domain in the United States. If an individual

work is unprotected by copyright law in the United States and you are located in the United States, we do not claim a right to prevent you from copying, distributing, performing, displaying or creating derivative works based on the work as long as all references to Project Gutenberg are removed. Of course, we hope that you will support the Project Gutenberg™ mission of promoting free access to electronic works by freely sharing Project Gutenberg™ works in compliance with the terms of this agreement for keeping the Project Gutenberg™ name associated with the work. You can easily comply with the terms of this agreement by keeping this work in the same format with its attached full Project Gutenberg™ License when you share it without charge with others.

1.D. The copyright laws of the place where you are located also govern what you can do with this work. Copyright laws in most countries are in a constant state of change. If you are outside the United States, check the laws of your country in addition to the terms of this agreement before downloading, copying, displaying, performing, distributing or creating derivative works based on this work or any other Project Gutenberg™ work. The Foundation makes no representations concerning the copyright status of any work in any country other than the United States.

1.E. Unless you have removed all references to Project Gutenberg:

1.E.1. The following sentence, with active links to, or other immediate access to, the full Project Gutenberg™ License must appear prominently whenever any copy of a Project Gutenberg™ work (any work on which the phrase “Project Gutenberg” appears, or with which the phrase “Project Gutenberg” is associated) is accessed, displayed, performed, viewed, copied or distributed:

This eBook is for the use of anyone anywhere in the United States and most other parts of the world at no cost and with almost no restrictions whatsoever. You may copy it, give it away or re-use it under the terms of the Project Gutenberg License included with this eBook or online at [www.gutenberg.org](http://www.gutenberg.org). If you are not located in the United States, you will have to check the laws of the country where you are located before using this eBook.

1.E.2. If an individual Project Gutenberg™ electronic work is derived from texts not protected by U.S. copyright law (does not contain a notice

indicating that it is posted with permission of the copyright holder), the work can be copied and distributed to anyone in the United States without paying any fees or charges. If you are redistributing or providing access to a work with the phrase “Project Gutenberg” associated with or appearing on the work, you must comply either with the requirements of paragraphs 1.E.1 through 1.E.7 or obtain permission for the use of the work and the Project Gutenberg™ trademark as set forth in paragraphs 1.E.8 or 1.E.9. 1.E.3. If an individual Project Gutenberg™ electronic work is posted with the permission of the copyright holder, your use and distribution must comply with both paragraphs 1.E.1 through 1.E.7 and any additional terms imposed by the copyright holder. Additional terms will be linked to the Project Gutenberg™ License for all works posted with the permission of the copyright holder found at the beginning of this work.

1.E.4. Do not unlink or detach or remove the full Project Gutenberg™ License terms from this work, or any files containing a part of this work or any other work associated with Project Gutenberg™.

1.E.5. Do not copy, display, perform, distribute or redistribute this electronic work, or any part of this electronic work, without prominently displaying the sentence set forth in paragraph 1.E.1 with active links or immediate access to the full terms of the Project Gutenberg™ License.

1.E.6. You may convert to and distribute this work in any binary, compressed, marked up, nonproprietary or proprietary form, including any word processing or hypertext form. However, if you provide access to or distribute copies of a Project Gutenberg™ work in a format other than “Plain Vanilla ASCII” or other format used in the official version posted on the official Project Gutenberg™ website ([www.gutenberg.org](http://www.gutenberg.org)), you must, at no additional cost, fee or expense to the user, provide a copy, a means of exporting a copy, or a means of obtaining a copy upon request, of the work in its original “Plain Vanilla ASCII” or other form. Any alternate format must include the full Project Gutenberg™ License as specified in paragraph 1.E.1.

1.E.7. Do not charge a fee for access to, viewing, displaying, performing, copying or distributing any Project Gutenberg™ works unless you comply with paragraph 1.E.8 or 1.E.9.

1.E.8. You may charge a reasonable fee for copies of or providing access to or distributing Project Gutenberg™ electronic works provided that:

- You pay a royalty fee of 20% of the gross profits you derive from the use of Project Gutenberg™ works calculated using the method you already use to calculate your applicable taxes. The fee is owed to the owner of the Project Gutenberg™ trademark, but he has agreed to donate royalties under this paragraph to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation. Royalty payments must be paid within 60 days following each date on which you prepare (or are legally required to prepare) your periodic tax returns. Royalty payments should be clearly marked as such and sent to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation at the address specified in Section 4, “Information about donations to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation.”
- You provide a full refund of any money paid by a user who notifies you in writing (or by e-mail) within 30 days of receipt that s/he does not agree to the terms of the full Project Gutenberg™ License. You must require such a user to return or destroy all copies of the works possessed in a physical medium and discontinue all use of and all access to other copies of Project Gutenberg™ works.
- You provide, in accordance with paragraph 1.F.3, a full refund of any money paid for a work or a replacement copy, if a defect in the electronic work is discovered and reported to you within 90 days of receipt of the work.
- You comply with all other terms of this agreement for free distribution of Project Gutenberg™ works.

1.E.9. If you wish to charge a fee or distribute a Project Gutenberg™ electronic work or group of works on different terms than are set forth in this agreement, you must obtain permission in writing from the Project Gutenberg Literary Archive Foundation, the manager of the Project Gutenberg™ trademark. Contact the Foundation as set forth in Section 3 below.

1.F.

1.F.1. Project Gutenberg volunteers and employees expend considerable effort to identify, do copyright research on, transcribe and proofread works not protected by U.S. copyright law in creating the Project Gutenberg™

collection. Despite these efforts, Project Gutenberg™ electronic works, and the medium on which they may be stored, may contain “Defects,” such as, but not limited to, incomplete, inaccurate or corrupt data, transcription errors, a copyright or other intellectual property infringement, a defective or damaged disk or other medium, a computer virus, or computer codes that damage or cannot be read by your equipment.

**1.F.2. LIMITED WARRANTY, DISCLAIMER OF DAMAGES - Except for the “Right of Replacement or Refund” described in paragraph 1.F.3, the Project Gutenberg Literary Archive Foundation, the owner of the Project Gutenberg™ trademark, and any other party distributing a Project Gutenberg™ electronic work under this agreement, disclaim all liability to you for damages, costs and expenses, including legal fees. YOU AGREE THAT YOU HAVE NO REMEDIES FOR NEGLIGENCE, STRICT LIABILITY, BREACH OF WARRANTY OR BREACH OF CONTRACT EXCEPT THOSE PROVIDED IN PARAGRAPH 1.F.3. YOU AGREE THAT THE FOUNDATION, THE TRADEMARK OWNER, AND ANY DISTRIBUTOR UNDER THIS AGREEMENT WILL NOT BE LIABLE TO YOU FOR ACTUAL, DIRECT, INDIRECT, CONSEQUENTIAL, PUNITIVE OR INCIDENTAL DAMAGES EVEN IF YOU GIVE NOTICE OF THE POSSIBILITY OF SUCH DAMAGE.**

**1.F.3. LIMITED RIGHT OF REPLACEMENT OR REFUND - If you discover a defect in this electronic work within 90 days of receiving it, you can receive a refund of the money (if any) you paid for it by sending a written explanation to the person you received the work from. If you received the work on a physical medium, you must return the medium with your written explanation. The person or entity that provided you with the defective work may elect to provide a replacement copy in lieu of a refund. If you received the work electronically, the person or entity providing it to you may choose to give you a second opportunity to receive the work electronically in lieu of a refund. If the second copy is also defective, you may demand a refund in writing without further opportunities to fix the problem.**

**1.F.4. Except for the limited right of replacement or refund set forth in paragraph 1.F.3, this work is provided to you ‘AS-IS’, WITH NO OTHER WARRANTIES OF ANY KIND, EXPRESS OR IMPLIED, INCLUDING BUT NOT LIMITED TO WARRANTIES OF MERCHANTABILITY OR FITNESS FOR ANY PURPOSE.**

1.F.5. Some states do not allow disclaimers of certain implied warranties or the exclusion or limitation of certain types of damages. If any disclaimer or limitation set forth in this agreement violates the law of the state applicable to this agreement, the agreement shall be interpreted to make the maximum disclaimer or limitation permitted by the applicable state law. The invalidity or unenforceability of any provision of this agreement shall not void the remaining provisions.

1.F.6. INDEMNITY - You agree to indemnify and hold the Foundation, the trademark owner, any agent or employee of the Foundation, anyone providing copies of Project Gutenberg™ electronic works in accordance with this agreement, and any volunteers associated with the production, promotion and distribution of Project Gutenberg™ electronic works, harmless from all liability, costs and expenses, including legal fees, that arise directly or indirectly from any of the following which you do or cause to occur: (a) distribution of this or any Project Gutenberg™ work, (b) alteration, modification, or additions or deletions to any Project Gutenberg™ work, and (c) any Defect you cause.

Section 2. Information about the Mission of Project Gutenberg™

Project Gutenberg™ is synonymous with the free distribution of electronic works in formats readable by the widest variety of computers including obsolete, old, middle-aged and new computers. It exists because of the efforts of hundreds of volunteers and donations from people in all walks of life.

Volunteers and financial support to provide volunteers with the assistance they need are critical to reaching Project Gutenberg™'s goals and ensuring that the Project Gutenberg™ collection will remain freely available for generations to come. In 2001, the Project Gutenberg Literary Archive Foundation was created to provide a secure and permanent future for Project Gutenberg™ and future generations. To learn more about the Project Gutenberg Literary Archive Foundation and how your efforts and donations can help, see Sections 3 and 4 and the Foundation information page at [www.gutenberg.org](http://www.gutenberg.org).

Section 3. Information about the Project Gutenberg Literary Archive Foundation

The Project Gutenberg Literary Archive Foundation is a non-profit 501(c)(3) educational corporation organized under the laws of the state of Mississippi and granted tax exempt status by the Internal Revenue Service.

The Foundation's EIN or federal tax identification number is 64-6221541. Contributions to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation are tax deductible to the full extent permitted by U.S. federal laws and your state's laws.

The Foundation's business office is located at 809 North 1500 West, Salt Lake City, UT 84116, (801) 596-1887. Email contact links and up to date contact information can be found at the Foundation's website and official page at [www.gutenberg.org/contact](http://www.gutenberg.org/contact)

#### Section 4. Information about Donations to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation

Project Gutenberg™ depends upon and cannot survive without widespread public support and donations to carry out its mission of increasing the number of public domain and licensed works that can be freely distributed in machine-readable form accessible by the widest array of equipment including outdated equipment. Many small donations (\$1 to \$5,000) are particularly important to maintaining tax exempt status with the IRS.

The Foundation is committed to complying with the laws regulating charities and charitable donations in all 50 states of the United States.

Compliance requirements are not uniform and it takes a considerable effort, much paperwork and many fees to meet and keep up with these

requirements. We do not solicit donations in locations where we have not received written confirmation of compliance. To SEND DONATIONS or determine the status of compliance for any particular state visit

[www.gutenberg.org/donate](http://www.gutenberg.org/donate).

While we cannot and do not solicit contributions from states where we have not met the solicitation requirements, we know of no prohibition against accepting unsolicited donations from donors in such states who approach us with offers to donate.

International donations are gratefully accepted, but we cannot make any statements concerning tax treatment of donations received from outside the United States. U.S. laws alone swamp our small staff.

Please check the Project Gutenberg web pages for current donation methods and addresses. Donations are accepted in a number of other ways including checks, online payments and credit card donations. To donate, please visit: [www.gutenberg.org/donate](http://www.gutenberg.org/donate).

Section 5. General Information About Project Gutenberg™ electronic works

Professor Michael S. Hart was the originator of the Project Gutenberg™ concept of a library of electronic works that could be freely shared with anyone. For forty years, he produced and distributed Project Gutenberg™ eBooks with only a loose network of volunteer support.

Project Gutenberg™ eBooks are often created from several printed editions, all of which are confirmed as not protected by copyright in the U.S. unless a copyright notice is included. Thus, we do not necessarily keep eBooks in compliance with any particular paper edition.

Most people start at our website which has the main PG search facility:  
[www.gutenberg.org](http://www.gutenberg.org).

This website includes information about Project Gutenberg™, including how to make donations to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation, how to help produce our new eBooks, and how to subscribe to our email newsletter to hear about new eBooks.